der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

19. Jahrgang | Nr. 121 (5/1983) | ISSN 001-4-0619 | 30 Pf

Monda asembleo por paco kaj vivo, kontraú nuklea milito

Tiu grava kaj granda manifestacio de porpacaj fortoj okazis en tagoj 21. — 26. 6. 1983 en la ĉefurbo de ĈSSR Praha. Partoprenis ĝin 3625 homoj el 132 landoj, inter ili 20 % el socialismaj landoj, 40 % el kapitalismaj landoj kaj 40 % el evolulandoj. Unu kvarono de la ĉeestintaro estis virinoj.

La inaŭguro de la Monda asembleo estis tre solena kaj kortuŝa. En la kongresalono eksonis la meloddio de „Odo pri ĝojo", komponita de L. v. Beethoven kaj kun vortoj de F. Schiller. La inaŭguron partoprenis la prezidento de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko kaj ĝenerala sekretario de Komunista Partio de ĈSSR, d-ro Gustav Husák. En sia prelego li esprimis la pensojn de ĉiuj ĉeestantoj, ke nur en paco oni povas konstrui feliĉan vivon sur la terglobo.

La prezidanto de Monda Packonsilio, sinjoro Romeŝ Ĉandra dankis al la ĉeĥoslovakaj registaro kaj popolo, ke ili ebligis la aranĝon de la Monda Asembleo en Praha.

Centoj da ĉeĥoslovakaj infanoj alportis florojn kaj propramane faritajn donacetojn por ĉiuj ĉeestantoj. Infanoj el Lidice alportis 41 rozojn el sia parko, kiuj rememorigis, ke pasis 41 jaroj de nazia besteco kontraŭ la loĝantaro de Lidice.

La traktadoj estis dividitaj en 11 dialogojn, en diversajn grupajn renkontiĝojn (p. e. virinoj, juristoj, kuracistoj, sciencistoj k. t. p.) kaj en malgrandajn renkontiĝojn (p. e. militveteranoj, kosmonaŭtoj kaj astronaŭtoj, komercistoj, komunikado inter homoj).

La renkontiĝon pri „komunikado inter homoj" partoprenis krom aliaj personoj el diversaj landoj ankaŭ esperantistoj: D-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM, anoj de la Internacia Komitato de MEM Drahomír Koĉvara kaj Milada Hemer-

ková el ĈSSR kaj Clément Tholet el Belgio; d-ro Jermař, prezidanto de ĈEA, inĝ. Vlastimil Koĉvara, vicprezidanto de ĈEA, Zdenko Křimsky, sekretario de ĈEA, inĝ. Margit Turková, redaktorino de ĉeha eldono de gazeto „Paco". Krome ĉeestis belga esperantisto René Deprez, anglaj esperantitoj Joyce Copland kaj Richard Howard. De elstara graveco estas la fakto, ke la Preparkomitato de la Asembleo komisiis ĝuste al CEA, kvazaŭ faka organizaĵo, prepari kaj gvidi la debaton pri komunikado. Motivo de tiu ĉi renkontigo estis sercado de rimedoj, kiamaniere eluzi komunikadon inter homoj por pacaj celoj kaj interkompreniĝo. D-ro Jermař klarigis en sia prelego la signifon de komunikado inter homoj. Oni konstatis, ke estas necese serĉi tion, kio homojn kunligas kaj ne tion, kio ilin disigas.

Joyce Copland diris, ke anglaj amaskomunikiloj (gazetoj, radio, televido) ĉiam mensogas en raportoj pri socialismaj landoj. Nun, kiam ŝi ellernis Esperanton, ŝi akiris verajn informojn pri socialismaj landoj.

René Deprez, belga profesoro, menciis, ke en okcidentaj landoj oni propagandis kiel internacian lingvon la anglan. Oni argumentas, ke ĝi estas la plej disvastigita. Sed kalkulante per kiu lingvo parolas la plejmulto, ni devus lerni la ĉinan. Sciencaj esploroj argumentas, ke por lerni fremdan lingvon oni bezonas multoble pli da tempo ol por lerni Esperanton. Li mem antaou 2 jaroj konis eĉ ne unu vorton de Esperanto, kaj antaŭ 14 tagoj li prelegis esperante pri arto en E-klubo Liège.

Delegito el Aŭstralio rekomendis plej multe eluzi la teknikon en interkomunikado. Hinda filmdirektoro parolis pri muziko, ke ĝi estas la plej bona komunikilo inter homoj, ke ĝi elvokas emociojn. Finna delegitino opiniis, ke estas utile interŝanĝi junajn eksterlandanojn. En familioj lernas gasto eĉ gastiganto kaj reciproke.

Clément Tholet diris, ke li konas 6 mondajn lingvojn kaj tamen lernis Esperanton. Li akiris multajn novajn amikojn en diversaj landoj.

La angla delegito parolis pri antisovetia propagando en multaj anglaj gazetoj.

La aŭstralia delegito diris, ke estas necese, por ke socialismaj landoj informu iliajn redaktorojn. Li mem akiris multajn adresojn kaj dumvoje hejmen volas viziti novajn amikojn.

D-ro Pethes rakontis pri hungara ministerio, kiu zorgas pri instruado de Esperanto en lernejoj.

Delegito el GDR diris, ke signifo de amaskomunikiloj kreskas de tago al tago. Germanaj esperantistoj laboras por la paco. Estas ankaŭ necese interŝanĝi kulturajn programojn inter la nacioj. Delegitino el Danlando parolis pri tio, ke danlandaj gazetoj priskribas socialismajn landojn tiel nigraj, ke iliaj delegitoj timis veturi al Praha.

El „komunikado inter homoj" estis ellaborita publika letero, kiu fariĝos parto de kompleta raporto de la Monda Asembleo.

La vespera manifestacio sur Malnovurba placo, je kiu ĉeestis 200 000 da homoj, dokumentis, ke la paco interesas ĉiujn. La angla 94-jaraĝa lordo Brockway en sia alparolo esprimis esperon, ke li ĝisvivos 100 jarojn kaj ke ĉiuj nukleaj armiloj estos likviditaj.

Ĉiutage oni daŭrigis en dialogoj — ofte ĝis la noktomezo.

En festkoncerto oni prezentis la vivon en paco kaj vivon en milito. Ooni montris ĉeĥoslovakajn popoldancojn en naciaj kostumoj, infanojn, feliĉajn homojn, projekciis filmojn el Hirošima, Nagasaki, Vjetnamio, Libanono k. t. p. Parolis vjet-

nama kura cistino pri la postsekvoj de milito kun Usono, parolis japanaj kuracisto kaj hibakŝo el Hiroŝima, ambaŭ pri propraj travivaĵoj de atombomba eksplodo.

Unu tago estis dediĉita al ekskursoj. La delegitoj vizitis 68 distriktojn kaj regionojn — peraviadile kaj peraŭtobuse, kie oni konatiĝis kun vivo kaj laboro de ĉeĥoslovakaj laboristoj, intelektuloj, kooperativanoj kaj ankaŭ kun infanoj en infanĝardenoj. La ekskursoj finiĝis en kulturdomoj en amikeca interbabilado. La eksterlandaj delegitoj ne avaris pri laŭdo de gastameco de ĉeĥoslovaka popolo, de bone preparita kaj organizita asembleo. La argentina delegito preskaŭ kun larmoj en okuloj bedaŭris, ke li ne povas publike paroli en sia lando pri la Monda Asembleo kaj diris, ke faŝismo translokiĝis post la dua mondmilito el Eŭropo en Argentinon. Indiano el Usono interesis sin pri laboro en kooperativo kaj ne volis kredi, ke ĉiuj homoj havas laboron.

La tre interesa loko en Palaco de kulturo, kie estis aranĝita la Monda Asembleo, estis „virina centro", kie virinoj en amikeca etoso traktis, amuziĝis, eĉ ripozis. Por virinoj tie kantis usona revolucia kantisto Dean Reed. Kosmonaŭtino Valentina Tereŝková diris, ke la loĝantoj de la terglobo fakte estas personaro de la kosma ŝipo „Tero" kaj, ke de ili dependas, ĉu ĝia flugo estos sukcesa.

Entute estis prezentitaj 1978 kontribuaĵoj. Ekaperis ankaŭ rimarkoj, ke ambaŭ nukleaj ĉeflandoj same kulpas pri nuna danĝera situacio, sed tiuj ĉi opinioj ofte estis kontraŭargumentitaj de samlandanoj mem. Bone respondis d-rino Elena Lagadinova, prezidantino de bulgaraj virinoj, el Sofio. Ŝi klarigis, kial socialismaj landoj ne povas konsenti kun unuflanka malarmado kaj kial ili ne kritikas siajn registarojn. Ŝi rekomendis al ĉiuj okcidentaj virinoj tralegi la deklaracion de Varsovia pakto el januaro 1983, kie ĉio estas klare skribita. (La deklaracio estas havebla en ses lingvoj — ankaŭ esperante. Mendu ĝin senpage ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 110 00 Praha, Jilská 10).

Sabato, la 25an de junio estis tago de solidareco kun nacioj de Afriko, Azio kaj Latina Ameriko.

La 26an de junio 1983 estis aprobita en la Monda Asembleo la Alvoko al ĉiuj homoj de la mondo por diri NE al novaj raketoj, NE al vetarmado, NE al produktado de nukleaj armiloj kaj iliaj elprovoj.

La prezidanto de MPK, sinjoro Romeŝ Ĉandra, adiaŭante diris: Praha-n ni neniam forgesos, ĝi por ĉiam restos en niaj koroj. Nia dialogo hodiaŭ ne finiĝis. Kune kun nia alvoko ni transprenos ĝin al Ĝenevo al Organizo de Unuiĝintaj Nacioj. Ni haltigos militon. Ni elkonstruos novan mondon. Vivu libereco kaj paco!

Estis neforgeseblaj tagoj en Praha kaj ĉiuj delegitoj forveturis hejmen kun belaj rememoroj. Ili promesis ankoraŭ pli forte labori por la paco. La tria mondmilito signifus finon por ĉiuj homoj en la mondo — konstatis ĉiuj delegitoj de la Monda Asembleo.

Milada Hemerková

El „Stralsundaj frekvencoj"

La monata informilo de la Distrikta Estraro Rostock de GDREA havas kiel aldonaĵon materialon de la Subdistrikta Estraro de GDREA el Stralsund sub la titolo „Stralsundaj frekvencoj". Jam aperis 19 numeroj. En unu el la lastaj (4/1983) Hans-Joachim Borgwardt traktas sub la titolo „Samideano" la respondecon de la esperantistoj por la pacbataloj montrante, ke Zamenhof estis aktiva humanisto. Interesiĝantoj pri la interesa materialo skribu al Hans-Joachim Borgwardt, 2300 Stralsund, Franz-Wessel-Str. 12.

Rekorda kongreso en la historio de Esperanto

Certe kongresojn oni ne taksu nur laŭ kvanto, ĉar sendube kvalito ofte estas pli grava ol kvantoj. Se ni tamen elstarigas la fakton, ke pli ol 5 000 esperantistoj partoprenis la 68an Universalan Esperanto-Kongreson de 30a de julio ĝis 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto, tiam pro la simpla ĝojo, ke tiel oni rompis la rekordon de 1923 (15a UK) en Nürnberg, kiun partoprenis 4 963 personoj.

La nombro relativiĝas i. a. pro jenaj proporcioj de landa reprezentado: ĉ. 2 000 poloj, ĉ. 500 bulgaroj, 600 hungaroj, 300 ĉeĥoj kaj slovakoj, 100 el Soveta Unio kaj 140 el GDR. Tamen tio estas ĝojigaj nombroj.

Sed ni lasu la ĵongladon per nombroj (kio, cetere, tute ne interesus la 5 000-an kongresanon, kiu dum preskaŭ la tuta kongreso dormis aŭ sucis lakton: la 5-monata Gabriele Corsetti el Italio).

La kongreso estis rimarkinda pro diversaj kaŭzoj:

1. Jam tradicie por la kongreso UEA montras sian malfermitecon al la mondaj problemoj. 1983 estas la Monda Jaro pri Komunikado. Kaj pro tio la kongreso havis kiel ĉefan temon „Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado". Tiun kadran temon oni tre serioze traktis. Aparte grava estis la partopreno de la plej alta funkciulo de tiu ĉi Monda Jaro de Komunikado, nome de Richard Butler, ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio, organizaĵo komisiita de Unuiĝintaj Nacioj kunordigadi la aktivecojn ĉirkaŭ la jaro. Butler faris tre gravan prelegon, kiun ni represas en la Esperanta traduko en tiu ĉi numero.

   Parto de la kongresa programo estis subprogramo, kiu traktis per pli ol 20 pluaj prelegoj la kongresan temon. Jen kelkaj el ili: prof. Humphrey Tonkin (Usono): Kulturaj kaj lingvaj aspektoj de la rilatoj inter la nacioj; prof. Magomet Isaev (USSR): La lingvaj aspektoj de la komunikado; László Deme (Hungario): Estonteco de lingvoj — la lingvo de estonteco; prof. Helmar Frank (FRG): La rolo de la Internacia Lingvo en la transpontigo de la lingvaj baroj de internacia komunikado; Wladislaw M. Grabski (Pollando): Scienco kaj kreado de internacia informa kaj komunikada ordo; d-ro Hans Michael Maitzen (Aŭstrio): Aŭtomata lingvopercepto, la Internacia lingvo kaj la rolo de ambaŭ por komunikado; Kerstin Kristoferson (Svedio): Per flugiloj de televido; A. P. M. Witkam (Nederlando): Maŝina traduko en teletekstaj sistemoj; Gianfranco Polerani (Italio): La lingvaj baroj kaj la sporto.

   Do vere digna faka elekto.

2. Rimarkinda ankaŭ estis la socia kaj publika prestiĝo de la kongreso. La alta protektanto estis la vicprezidanto de Hungario, Sándor Gáspár, kiu samtempe estas prezidanto de la hungaraj sindikatoj kaj de la Monda Sindikata Ligo. Al la protektantoj ankaŭ apartenis la vica ministroprezidanto István Sarlós. Ambaŭ elstaraj politikistoj parolis antaŭ la kongresanaro. Ni publikigas partojn de la paroladoj. La urbo mem estis digne ornamita. Rimarkeblis, ke Esperanto-kongreso okazas en Budapest. La gazetaro, radio kaj televido abunde raportis.

3. La scienca programo de la kongreso estis altkvalita. Sub la rektoreco de prof. d-ro Otto Haszpra prelegis 9 fakuloj en la kadro de la 36a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. Otto Haszpra (H), Vilmos Benzcik (H), Helmar Frank (FRG), So Gilsu (Suda Koreujo), Rudi Hanger (CH), Hans-Joachim Plehn (A), Hristo Marinov (BG), Hans Eichhorn (GDR), Béla Mészáros (H). Inter la laŭde menciitaj prelegoj estis tiu de d-ro Eichhorn pri „Medicino aŭ/kaj psikoterapio? Kuracisto inter biologio kaj psikologio". Jam la 6an fojon okazis Internacia Esperantologia Konferenco, ĉifoje sub gvido de docento d-ro István Szerdahelyi. Prelegis li, d-ro Vaitilavičius (USSR), d-ro Wacha (Hungario) kaj R. Rukicky (Pollando). Bedaŭrinde la prelegoj estis foje tro longaj kaj absolute mankis tempo por ion ajn diskuti. En diversaj kunsidoj oni debatis pri la faka agado, la apliko de Esperanto por fakaj (aparte scienc-teknikaj sed ne nur) celoj. Valoras mencii la fakton ke dum aparta kunveno terminologie interesitaj fakuloj elektis estraron de establiĝadanta Terminologia Sekcio (TeS) ĉe Scienceldona Centro de UEA. Tiu instanco estis iniciatita de Wera Dehler el GDR kaj havas i. a. la taskon kunordigadi la terminologiajn aktivecojn en la sfero de la faka apliko de Esperanto. Oni elektis kiel estron de TeS d-ron Árpád Mathé (Hungario). Al la faka profilo de la kongreso ankaŭ apartenis ekspozicio pri mikroelektroniko, kiun oni povis rigardi en la kongresejo.

4. La kongreso ankaŭ ĉifoje havis abundon da fakaj alispecaj aranĝoj. En la grandega kongresejo, kiu verŝajne sufiĉus por 10 000 homoj, multaj tre belaj sed malfacile troveblaj ejoj servis por ĉirkaŭ 190 aranĝoj; inter ili kunsidoj pri agado ĉe UN, publika kunveno de la Akademio de Esperanto (kie oni bedaŭrinde denove ne diskutis pri la funkcio kaj rolo de la Akademio), asembleo de fakaj asocioj, belartaj konkursoj, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Cseh-kursoj, ĝeneralaj kunsidoj de UEA, lingvokurso por la hungara lingvo, aranĝoj de matematikistoj, sciencistoj, filologoj, junuloj, ornitologoj, sportistoj, medicinistoj k. a.

   Tre gravaj estis kelkaj tuttagaj konferencoj, en la kadro de la kongreso: tago de lernejo (Esperanto-instruado, kiel kontribuo al interkultura informado) kaj la kooperativa konferenco.

5. Aparte abunda estis la kultura kaj distra programo. Jam estas konate, ke la hungaroj avangardas pri apliko de Esperanto en la kultura sfero. Konatiĝis i. a. la teatraj semajnoj 1982 kaj 1983 dum la printempo. Al la riĉa kultura programo apartenis la hungara nacia vespero, internacia korusa koncerto, la Internacia Arta Vespero (denove multe tro longa kaj malekvilibrita). Aparte menciindas la „Malnovmoda Komedio" de A. Arbuzov en la prezento de la bulgaraj profesiaj aktoroj Belka Beleva kaj Anani Anev, krome „La lasta magnetofonbendo de Krapp" (Beckelt), „La mortintoj de Spoon-River (Masters), „Sen eliro" (Sartre), „Zamenhof" (verko kaj prezento de Jadwiga Gibczynska, Pollando), „Ĉu vi vidis jam la piedsignojn de l'profeto? (Elem), „Epifanio" (Shakespeare), „Johano la brava" (pupteatraĵo laŭ la versrakonto de Petöfi) k. a. Grandega elekto.

   Al la distra programo apartenis la balo, dancvesperoj, junulara vespero kaj kvizoj (pri Hungario kaj la 75-jara UEA).

   Ne mankis ekskursoj kaj renkontiĝo kun Budapeŝtanoj en la urba parko. Bulgara Esperanto-Asocio invitis krome al vizito de ekspozicio pri BEA, kaj el Pollando venis eksponaĵoj pri etnografiaĵoj. Pli malpli publika muzeo fariĝis ankaŭ la grandega, zorge kultivita kaj flegita privata Esperanto-kolekto de Károly Fajczi kun ĉirkaŭ 5 000 libroj. (Sed pri tio ni okaze skribos aparte).

6. De aparta graveco estis la publika MEM-kunveno sub gvido de Clément Tholet (Belgio), kiun partoprenis ĉirkaŭ 200 homoj. Tiu kunveno de MEM estis omaĝo al la 30-jara jubileo. La prelegantoj kaj diskutantoj substrekis la grandan danĝeron, en kiu ŝvebas la aktuala mondo pro la plano pro lokigo de raketoj fare de Usono en okcidenta Eŭropo. Valoras mencii, ke partoprenis la kunsidon la sekretario de la Mondo Packonsilantaro, d-ro Károly Lanko, kiu prezentis personan mesaĝon de Romesh Chandra, prezidanto de la Monda Pạckonsilantaro.

   Kun la helpo de Hungara Packonsilantaro estis eldonita jubilea broŝuro pri MEM kaj informiloj pri la hungara pacmovado.

7. Al la kongreso apartenis certagrade la 20a internacia infana kongreseto kaj infana tendaro. La ekapero de la infanoj dum la kongresaj malfermo kaj fermo estis kortuŝaj momentoj.

8. Bedaŭrinde multaj funkciuloj de la Esperanto-movado ne tro povis ĝui la kongreson aŭ eĉ viziti tro da aranĝoj. Ili sidis en la Komitato de UEA aŭ en multaj komisionoj kaj laborgrupoj. La Komitato akceptis kelkajn gravajn decidojn. Kun aparta ĝojo oni povis noti la akcepton de Kuba Esperanto-Asocio kiel kolektivan membron de UEA. Tiel la Esperanto-Asocio vere pli kaj pli universaliĝanta nun havas 45 kolektivajn membrojn. En la jaro 1974 ĝi havis 34.

9. Ankoraŭ multo estus menciinda. La bonega kongresa kuriero (6 numeroj), kiun redaktis Àrpád Mathé, la libroservo, la multaj akceptoj (en la Parlamento, ĉe la Hungara Packonsilantaro, la Virina Organizaĵo k. t. p.). Sed pleje gravas danki al Hungara Esperanto-Asocio, kiu transprenis la organizadon de tiom multflanka, ne senkomplika kaj superforte granda kongreso kaj per tio ebligis al multaj esperantistoj sperti, kio estis vivanta Esperanto en la praktika realeco.

10. La esperantistoj el GDR uzis la ŝancon kaj, malgraŭ jam krime altaj prezoj, tamen decidis partopreni. 95 apartenis al 3 vojaĝoficejaj grupoj, aliaj 40 — 50 venis individue. Verŝajne por komencantoj aŭ kongresnovuloj la „grandeĝa kaldrono" estis sufiĉe streĉa. Kaj tamen ili ne forgesos tiun travivaĵon. En GDR nur pri la kongreso aperis pli ol 60 artikoloj, 3 radiointervjuoj kun Detlev Blanke kaj unu kun Michael Lennartz. Al multaj aktivuloj la kongreso donis novajn impulsojn. Ni uzu ilin. D. Blanke

---

En Debrecen

39a Kongreso de TEJO

Jam la duan fojon en Hungario okazis kongreso de Tutmonda Esperantista Junularo Organizo. Jam 1966 Hungario gastigis junajn esperantistojn, en Pecs. Ĉijare Debrecen estis la kongresurbo. De 23. — 30. julio 1983 kolektiĝis pli ol 650 junaj esperantistoj el 64 landoj, inter ili plej forte reprezentiĝis Pollando (274), Hungario (nur 56), Bulgario (49), Sovetunio (40) kaj GDR (38). Do, laŭ la statistiko GDR jam venis je la 5-a loko, kio estas rimarkinda kaj atestas, ke la junulara Esperanto-movado en GDR faris progresojn. La kongreso traktis kiel

kadran temon „Informfluo en la nuntempa mondo". En la kadro de tiu ĉi temo oni prezentis multajn fakajn kaj popularsciencajn prelegojn por i. a. respondi demandojn kiel

— Ĉu estas la fino de la Gutenberg-galaksio?

— Mikroelektroniko kaj socio: Ĉu beno aŭ malbeno?

— Ĉu malpliiĝas la lingva malegaleco en la mondo?

— Ĉu Esperanto disvastiĝos rapide kiel ilo de internacia komunikado?

— Ĉu la evoluo de telekomunikado radikale ŝanĝos la privatan vivon?

— Ĉu estiĝos nova internacia informada ordo?

— Ĉu la komputiloj parolos home?

Al la bunta spektro de la pli festivala ol kongresa kongreso ankaŭ apartenis programeroj kiel: urborigardado, filmprojekciado pri Debrecen kaj departemento Hajdú-Bihar, interkona vespero, Esperantobazaro, subĉiela balo, renkontiĝo de esperantistoj-kantistoj, hungara vespero, sportaj programoj, pupteatro, internacia vespero, koncerto, sinprezento de korusoj, prezentado de originala Esperanto-dramo, vespero pri Petöfi, vizitoj en la lokaj junularaj kluboj, ekskurso al Hortobágy, dancado, adiaŭa vespero.

Krome, kompreneble kunsidis la estraro kaj komitato de TEJO kaj prenis novajn decidojn. Jen kelkaj prelegoj, kiuj estis prezentitaj dum la kongreso:

— amaskomunikado: Strukturoj de la aŭtonomio kaj manipulado

— la alia modelo de la gazetara strukturo

— pri Nova Internacia Informada Ordo

— elektronika industrio el hungara vidpunkto

— pri la agado de la Scienca Eldon-Centro de UEA

— komunikado kaj komputado

— problemoj de la televido en la lastaj du jardekoj de la jarcento

— ĉu orientalismigi Esperanton?

— problemoj de la plantoprotektado.

Do ege scienca programo. Sed, feliĉe, ne nur tia estis la kongreso. Ne mankis teatraj aranĝoj (kun Róbert Bársky, la trupo Garabonciás), konkurso pri la mondkonata magia kubo, dancvesperoj, amuzoj, demonstracioj k. a.

Inter la gastoj, kiuj salutis la kongreson estis kelkaj eminentuloj, i. a. Miklos Barabas, prezidanto de Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ) kaj Hector Morales, vicprezidanto de la Internacia Unuiĝo de Studentoj (IUS). Estis ebleco por landaj delegitoj informi pri sia lando. Pri GDR prelegis Elke Valtin kaj Bert Schumann. Laŭdinda estis la klopodo de Ursula Prittmann (FRG) informi pri la internacia kampanjo kontraŭ malsato en la mondo. Ĉar ĉiu organizajo bezonas estraron, ankaŭ TEJO havas ĝin. Oni elektis
Ian Jackson (Britio), prezidanto
Martin Haase (FRG), vicprezidanto
Zsofia Kóródy (Hungario), vicprezidantino
Norberto Salétti (Italio), ĝenerala sekretario, kaj kiel pluaj membroj
André Staes (Belgio), Maŝa Vančurova (ČSSR), Jan Koszmaluk (Pollando) kaj Neven Kovačič (Jugoslavio).
La 40a TEJO-Kongreso okazos 1984 en Swanwick, Grandbritio.

Rezolucioj de la 68a Universala Kongreso de Esperanto

I

La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto en Budapeŝto kun (4992) reprezentantoj el (50) landoj,

traktinte la sociajn kaj lingvajn aspektojn de la moderna komunikado,

konsciante pri la rapidega evoluo sur la kampo de komunika teknologio, kaj pri la graveco rilatigi Esperanton al la modernaj komunikiloj,

konstatinte, ke la sukcesigo de Esperanto grandparte dependos de la kapablo de ties parolantoj resti en kontakto kun la moderna komunika teknologio kaj montri al la mondo kiel ĝi povos esti utiligata por krei pli justan kaj demokratan ordon, en kiu Esperanto ludas esencan rolon,

alvokas al la Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj al ĉiuj sciencaj instancoj okupiĝantaj pri la internacia lingvo doni pli da atento pri komunika teknologio, studi tiun ĉi problemaron, eduki siajn membrojn pri ĝi kaj informi la koncernajn neesperantistajn mediojn pri la perspektivoj de la aplikado de Esperanto en tiu ĉi kampo.

II

La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto en Budapeŝto kun (4992) reprezentantoj el (50) landoj.

studinte la planojn starigitajn de diversaj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj **traktinte** la ĝisnunajn agadojn rilate al la Centjara Jubileo de Esperanto,

konsiderante, ke la Centjara Jubileo prezentos en la venontaj jaroj nepreterlaseblajn eblecojn por atentigi pri Esperanto,

alvokas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj tra la mondo doni prioritaton al laboroj tiurilataj.

III

La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto kun (4992) reprezentantoj el (50) landoj,

traktinte la sociajn kaj lingvajn aspektojn de la moderna komunikado,

konstatas, ke kvankam la komunika teknologio prezentas eblecojn solvi mondajn komunikajn problemojn kaj plialtigi la vivnivelon de parto de la homaro, ĝi riskas — se ne juste kaj demokrate uzata — pligrandigi la fendon inter tiuj, kiuj havas kaj tiuj, kiuj ne havas la rimedojn de komunikado. Tiu risko estas aparte aktuala kiam temas pri evolulandoj rilate al industrilandoj, sed ĝi ankaŭ ekzistas interne de unuopaj landoj.

atentigas pri tio, ke la teknologia kaj lingva flankoj de komunikado ne estas disigeblaj,

rekomendas al organizaĵoj interesitaj pri komunikado doni pli da atento al la lingvaj dimensioj de la internacia komunikado kaj al la rolo, kiun Esperanto — per siaj facileco kaj neŭtraleco — povus ludi en tiu kunteksto,

alvokas al organizaĵoj okupiĝantaj pri lingva edukado kaj aliaj lingvaj demandoj doni pli da konsideroj al la rezultoj de la evoluo de la komunika teknologio kaj al ties implicoj rilate la nunan lingvan ordon en la mondo cele al ĝia plijustigo kaj plidemokratigo.

Honoraj membroj de UEA

Tiu ĉi elstara honorigo estis atribuata al la jenaj eminentaj esperantistoj:
Prof. István Szerdahelyi (Hungario)
Evert J. Woessink (Nederlando)
Francisco de Souza Almada (Brazilo)
Prof. M. H. Saheb-Zamani (Irano)

Universala Esperanto-Asocio — 75-jara

La ĉefa internacia Esperanto-organizaĵo fondiĝis en la jaro 1908 (28. 4.) je la iniciato de 21-jara sviso Hector Hodler. La kreo de internacia organizaĵo estis necesa, ĉar Esperanto komence de la 20a jarcento estis atinginta nivelon de disvastigiteco, ke necesis kunordigadi la praktikan aplikon kaj disvastigon de la lingvo. La ĉiujare aperintaj adreslibroj kun novaj esperantistoj kaj la aktivecoj de la Esperantista Centra Oficejo de Sebert kaj Javal en Parizo kiel informejo kaj servejo ne plu sufiĉis. Krom tio la konkurenca projekto Ido (1907 de Couturat) komencis enradikiĝi kaj forlogi parton de la gvidantaro de la tiama movado. La kreo de UEA do ankaŭ servis al la stabiligo de la tuta movado.

UEA faris multajn konkretajn servojn al la disfloranta movado. Tamen ne mankis priorganizaj bataloj kaj kvereloj. La unua mondmilito donis fortan baton. La delegita reto de UEA estis uzita kiel informebleco pri la milito flanke de germanoj same kiel flanke de francoj kaj italoj. Dum la 20aj jaroj certaj sukcesoj ĉe la Ligo de Nacioj estis noteblaj sed ankaŭ iluzioj. Internaj problemoj en UEA kaj fortaj financaj problemoj — ĉio ĉi certe kiel reflekto de la malstabila politika kaj ekonomia situacio en Eŭropo — kondukis UEA dum la 30aj jaroj al grava financa kaj identeca krizo. 1936 fondiĝis dua internacia organizaĵo, Internacia Esperanto-Ligo (IEL), al kiu aliĝis preskaŭ ĉiuj landaj asocioj kaj ankaŭ plimulto de la individua membraro (1938 ĉ. 13 000 membroj en 60 landoj).

Nur post la dua mondmilito, en la jaro 1947 IEL kaj UEA kunfandiĝis. La postmilita tempo kaj aparte la „malvarma milito" ne estis tre favoraj al evoluo de internacia Esperanto-movado kaj ties centra organizaĵo. Tamen oni povis noti relative bonan evoluon al stabila organizaĵo kun propra centra oficejo, gazeto, praktikaj servoj, libroeldonado, kongresoj kaj plifortiĝantaj rilatoj al neesperantistaj mondaj organizaĵoj. De aparta graveco estis la kontakto al UNESKO, kiu trovis forman de oficialeco en la jaro 1954, kiam la Ĝenerala Konferenco en Montevideo aprobis la faman rezolucion, kiu tekstas jene:

IV. 1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto;

IV. 1.4.422. Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV. 1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO;

IV. 1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV. 1.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

La Asocio faris multflankan laboron dum la 50aj kaj 60aj jaroj. Sed dum la 60aj jaroj, aparte komence de la 70aj, montriĝis, ke UEA havis malfacilon adoptiĝi al la ŝanĝiĝinta mondo kaj respekti ties realecojn. Internaj problemoj en la estraro kaj en aliaj gvindinstancoj kreskis tiom, ke 1974 en Hamburgo la estraro tute

novformiĝis. UEA eniris novan etapon de ĝis evoluo. Tiu etapo estas karakterizita i. a. per

— venko de gravaj financaj problemoj,

— Konkretigo de la kunlaboro kun UNESKO kaj grava pliampliksigo de la rilatoj al neesperantistaj organizaĵoj,

— konsiderinda pliuniversaliĝo de la Asocio, ĉar aliĝis post 1974 al UEA ekzemple la Esperanto-organizaĵoj el Brazilo, Slovakio, Ĉilio, Ĉinio, GDR (1976), Islando, Kolombio, Koreujo (Suda), Luksemburgo, Malto, Meksikio, Peruo, Portugalio, Venezuelo kaj Kubo (1983),

— organizo de plej grandaj universalaj kongresoj post la dua mondmilito (1978 en Varno, 1983 en Budapeŝto),

— pliampleksigo kaj pliprofundigo de la fakaplika komponento (Scienco kaj tekniko),

— plifortiĝo kaj disbranĉiĝo de la administra strukturo (oficejoj: la centra en Rotterdam, UN-oficejo en New York, grafika centro en Antverpeno, sciencel-dona centro en Budapeŝto),

— pli klara kulturpolitika kaj lingvopolitika profilo de la Asocio, proksima al tiu de UNESKO kaj al la principoj de la Fina Akto de Helsinki.

De aparta graveco estis la akcepto de nova statuto de UEA, kiu certagrade erflektas la atingitan evolustaton de la Asocio.

Ni citas gravajn partojn el la statuto:

„§ 2 **Konsisto. Membroj de la Asocio povas esti:**

a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;

b) individuaj membroj, konsistantaj el naturaj personoj kaj juraj personoj.

§ 3 **Celoj. La celoj de UEA estas:**

a) disvastigis la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;

b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;

c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;

d) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

§ 4 **Rimedoj.** Por atingi siajn celojn, la Asocio laboras per kunordigo de la diversaj Esperanto-asocioj, studoj kaj esploroj, publikigo de libroj kaj aliaj eldonaĵoj, informa agado, servoj al la parolantoj de Esperanto, okazigo de kongresoj kaj konferencoj, kunlaboro kun aliaj similcelaj asocioj kaj apliko de aliaj jure permesitaj rimedoj, kiuj proksimigas la celojn de la Asocio.

§ 5 **Neŭtraleco.** UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio kaj sociaj kaj politikaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj. Tiu neŭtraleco signifas, ke UEA ne prenas starpunkton pri la koncernaj

problemoj. Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj, estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.

§ 6 **Lingvo.** La oficiala lingvo de UEA estas la Internacia Lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento, per la verkaro de ĝia iniciatinto Zamenhof kaj per la ĝenerala lingvouzo kontrolita de la Akademio de Esperanto.

§ 7 **Sidejo.** La ĉefsidejo de UEA (nomata la Centra Oficejo) estas en Rotterdam, Nederlando. La Estraro rajtas funkciigi pliajn oficejojn laŭbezone ...

§ 13 **Landaj asocioj.** Por aliĝi al UEA la kondiĉoj por landa Esperanto-Asocio estas, ke ĝi plenumas la kondiĉojn priskribitajn en la Ĝenerala Regularo, ke ĝi estas asocio laŭorde organizita kaj vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro politika aŭ religia sinteno aŭ pro raso, lingvo aŭ sekso, kaj ke ĝi skribe konfirmas sian pretecon respekti la Statuton kaj regulojn de UEA, precipe ĝian neŭtralecon. Landa asocio pagas por ĉiu sia membro, kiu ne estas individua membro de UEA, jaran kotizon difinitan de la Komitato.

Kondiĉo por daŭra aliĝinteco estas, ke la Komitato restas kontenta pri plenumo de la jam difinitaj kondiĉoj kaj deklaro.

Principe UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion, sed la Komitato rajtas akcepti plurajn ..."

Kaj pri la junulara sekcio de UEA:

„§ 30 **Nomo kaj regularo.** La junulara sekcio de UEA estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (mallonge nomata TEJO). Ĝi estas integra parto de UEA. Ĝian agadon kaj internan organiziĝon difinas aparta regularo, kiu bezonas la aprobon de la Komitato de UEA ..."

UEA hodiaŭ havas individuajn membrojn en 96 landoj. Aliĝis al ĝi kiel kolektivaj membroj la landaj organizaĵoj el 45 landoj, inter ili tiuj el Bulgario, Ĉinio, Ĉeĥoslovakio (ĉeĥa kaj slovaka), GDR, Hungario, Jugoslavio, Kubo, kiuj sume reprezentas en la jaro 1982 18 107 kolektivajn membrojn de entute 35 411 (de 44 aliĝintaj asocioj, sen Kubo), tio estas 51,1 %. En 1983 aliĝis la asocio de Kubo kaj 1984, tiel ASE deklaris en Budapest, la sovetia asocio membriĝos en UEA.

La estonto de UEA ĉefe dependas de du faktoroj: unue de la evoluo de la internacia politika situacio kaj due de la kapablo de UEA mem konsideri tiun situacion kaj reagi al ĝi. Ni esperu pri plua bona evoluo de tiu-ĉi plej grava Esperanto-organizaĵo nuntempa.

D. Blanke

Senpagaj materialoj pri Komunikado

1983 estas la ‚Monda Komunika Jaro'. Ĝi estas samtempe la unua jaro de la kvin-jara laboro por festado de la jubileo de Esperanto.

La ligeteco inter la internacia lingvo kaj komunikado estis reliefigita de la ĝenerala sekretario de la Internacia Telekomunika Unio, R. E. Butler, okaze de la inaŭguro de la ĉi-jara Universala Kongreso.

Pluraj landaj asocioj kaj lokaj grupoj jam aranĝis kunvenojn por esperantistoj kaj ne-esperantistoj pri komunikado kaj Espepranto.
Nun estas via vico!

UEA disponigas al vi senpage fotokopiojn de ĉiuj artikoloj pri ĉi tiu temo, aperintaj en la esperantlingva gazetaro.

Kontaktu: UEA/Jubilea Jaro
Frankrijklei 140
B—2000 Antwerpen
Belgujo

„Monda Komunika Jaro kaj malŝlosiloj al komunikado"

Parolado de Richard E. Butler, ĝenerala sekretario de la Internacia Telekomunika Unio, dum la inaŭguro de la 68a Universala Kongreso de Esperanto.

Sinjoro prezidanto kaj gesinjoroj,
Estas plezuro por mi akcepti vian afablan inviton partopreni en la inaŭguro de la Universala Kongreso de Esperanto. Foje iu diris, ke komunikado estas la komenco de ĉia interkompreno. Tiu dirajo bone povus esti devizo kaj por Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj por Internacia Telekomunika Unio (ITU).

Jam de sepdek kvin jaroj via Asocio senlace klopodas ampleksigi internacian komunikadon kaj interkomprenon, kaj interproksimigi la popolojn de la mondo per komuna lingvo. Interkomunikado estas ŝlosila faktoro en la socia, ekonomia kaj kultura evoluo de la nacioj kaj por kompreno inter la popoloj. Kiel ofte lingvaj baroj kaŭzas miskomprenojn inter popoloj kaj nacioj — kaj tio okazas spite al senprecedenca teknologia evoluo kaj ties aplikado por tuja komunikado tra la mondo. En tiu ĝenerala kunteksto, ambaŭ niajn organizajojn koncernas esencaj elementoj de la perilo pli ol la mesaĝo; vin, UEA, dum vi provas venki lingvajn barojn, por komuniki inter malsamaj nacioj kaj popoloj per la uzo de universala lingvo, nin, ITU, per teknikologiaj rimedoj, por transsalti la distancojn kaj nuligi vojaĝtempon. La mondo de la komunikado estas akre konscia, ke nuraj teknikaj rimedoj ne donas efikan komunikadon. Devas troviĝi almenaŭ du homoj por ekkomuniko, kaj ni ĉiuj scias, ke se tiuj du homoj ne komprenas la parolojn unu de la alia, ne realiĝas komunikado.

Tio same veras por telekomunikaj sistemoj; la terminalaj ekipaĵoj, fabrikitaj de malsamaj landoj, devas, inter certaj limoj, havi la samajn karakterizajojn por povi kune funkcii. Alivorte, ili devas esti funcie akordigeblaj. La samo validas en la kazo de transmisiaj retoj de ĉiu lando, kiuj sen grandskala normigo ne povus esti kunligitaj por formi la nuntempan tutmondan telekomunikan retaron. Tio fakte, estas la historio pri la origino de ITU. Kiam oni inventis la elektran telegrafon en la 1830aj jaroj, oni tuj komprenis, ke ĝi estas tute nova dimensio de komunikado, kiu povas venki la problemojn de distanco kaj vojaĝtempo, ĝis tiam nesupereblajn . . . La funkciode ITU, jam de ĝia komenco kiel Internacia Telegrafa Unio en 1865, estis krei la kondiĉojn, kiuj ebligus internacian interkonekton de naciaj retoj. Estas grave substreki ĉi tion; ne temis pri la starigo de internacia reto kiel io aparta disde naciaj retoj, sed temis pri certigo, ke estu grado de komuneco inter la naciaj retoj, tiel ke ili povu esti relative interkonekteblaj. Tiu koncepto aŭ gvida principo validas jam de la plej simpla telegrafa ekipaĵo, kiu ekzistis en 1865, ĝis la modernaj telekomunikaj sistemoj, kiujn oni konsideras por estonta enkonduko.

La problemo krome ne limiĝas el certigo de interakordebleco, sed oni devas ankaŭ teni komunikajojn apartaj, kie necesas. La invento de la radio-ricevilo kunportis la problemon de ĝena perturbado inter elsendejoj, kaj la fakto, ke radio-ondoj disvastiĝas laŭ la leĝoj de la fiziko kaj ne laŭ tiuj de la homo, tiel ke ili ne atentas homfaritajn landlimojn, kaŭzas ke ITU devas trakti la internacian planadon kaj kunordigon de la uzo de la radiofrekvenca spektro kaj per tio, certagrade, tiun de la uzo de la spaco kaj speciale de la terrilate senmova orbito.

Tamen, spite al ĉiuj ĉi grandaj teknikaj atingoj, la mondo multrilate ankoraŭ neniel sukcesas provizi eĉ minimuman telekomunikan servon al granda parto de la tergloba loĝantaro.

Fakte, kiel provizi per eĉ la plej simpla telekomunikilo je promena distanco tre konsiderindan parton de la monda loĝantaro, tio prezentas unu el la plej grandaj telekomunikaj problemoj kaj defioj de nia tempo.

La telefono, inventita antaŭ pli ol cent jaroj, estas la ideala ilo. Ĝin povas uzi ĉiu, sed ĝi ankoraŭ ne multe influis la profunde kamparajn kaj forajn regionojn de la mondo. La kialo malantaŭ tio estas la kosto kaj certagrade la teknologio. Sed ni ne plu povas kulpigi tiujn faktorojn nun. La problemon oni povas solvi surbaze de kunlabora divido de rimedoj, sufiĉa prioritata investado kaj kunlabore norde-sude kiel ankaŭ interne de la sudo. Teknologio kaj kunlaboro ja povas tiel doni egalan aliron al komunikado por ĉiuj, kaj nun je malalta kosto.

En ITU mi rigardas la komunikadon kiel ilon por evoluigo, precipe socia kaj ekonomia. Ni povas, kompreneble, mezuri aŭ taksi ekonomian progreson rilate al la vivnivelo kaj — kondiĉoj, kaj tiel ni alvenas, al la komparo inter la „havuloj" kaj „malhavuloj" aŭ al tio, kio ofte nomiĝas la „evolu-breĉo".

La ciferoj klare parolas. En 1982 troviĝis proksimume 550 milionoj da telefonoj en la mondo kaj 600 milionoj da televidiloj. Proksimume 15 procentoj de la nacioj uzas 90 procentojn de ĉi tiuj telefonoj kaj televidoj, dum 85 procentoj de la nacioj de la mondo devas elturniĝi kun la restantaj 10 procentoj. Ĉi-speca malekvilibro kondukis al tio, ke la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1983 Monda Komunika Jaro kun la temo „Evoluigo de komunikilaj substrukturoj". La bazaj celoj, deciditaj de la Ĝenerala Asembleo de UN, estas „doni la eblecon el ĉiuj landoj entrepreni profundan esploron kaj analizon de sia politiko pri la evoluigo de komunikado" kaj „faciligi akcelatan evoluigon de komunikilaj substrukturoj".

ITU estis nomita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel la gvida organizajo por la aktivado de Unuiĝintaj Nacioj

kaj ties Specialaj Organizaĵoj rilate al la Jaro. La ĝenerala sekretario de ITU estas la kunordiganto de la Monda Komunika Jaro inter la UN-organizaĵaro. Un kaj la koncernaj specialaj organizaĵoj proksime kunlaboras kun ITU, por efektivigi vastan gamon da programoj, projektoj kaj agadoj por plenumi la celojn, deklaritajn de la Ĝenerala Asembleo de UN. Troviĝas apartaj roloj por Unesko kaj Universala Poŝta Unio kiel ankaŭ por koncernaj uzantoj kiel ekzemple: Monda Organizajo pri sano, Organizajo Internacia pri Civila Aviado, Monda Organizajo pri Meteologio kaj Nutraĵa kaj Agrokultura Organizajo. Aldone multaj neregistaraj organizaĵoj proponis sian subtenon. Ĉi-loke mi aparte ŝatus varme bonvenigi la ambician programon de via Asocio, kiu fondos fakterminaron por komunika teknikologio. Mi estas certa, ke tiu entrepreno havos sekvojn, kiuj longe superos la skribadon en Esperanto kaj esperantigon de tekstoj pri komunikado.

La Monda Komunika Jaro tamen ne estas nur agado, kiu okazas sur la nivelo de internaciaj organizaĵoj, sed ĝi intime koncernas tion, kio okazas sur la nacia nivelo, ĉar la celo estas finfine plibonigi la aliron al komunikado por la ordinara homo.

Unuopaj registaroj starigis 63 naciajn komitatojn por plenumi la programon de la Monda Komunika Jaro en la koncernaj landoj. En multaj landoj tiuj komitatoj nur por la unua fojo enkondukas kompleksan kaj praktikan kunordigon sur la kampo de komunikado. Mi esperas, ke la komitatoj estos antaŭuloj de konstantaj naciaj komitatoj por kunordigo.

65 ŝtatestroj akceptis aliĝi al Internacia Honora Komitato por doni sian patronecon kaj moralan subtenon al la celoj de la Jaro. Ĉio ĉi tendencas al plenumo de la celo „Unu mondo, unu reto", kiu estis la celo ankaŭ de la ĉijara Monda Telekomunika Tago.

Tamen ni devas neniam pretervidi la malpli palpeblajn sed eble pli signifajn aspektojn de la komunikado.

La Internacia Komisiono por Studado de Komunikaj Problemoj, ofte konata kiel la Komisiono de MacBride (makbrajd), deklaris konklude (paĝo 258): „Evoluigaj strategioj devus enhavi komunikadan politikon kiel integran parton en la diagnozo de bezonoj kiel ankaŭ en la projektado kaj efektivigo de elektitaj prioritatoj. Ĉi-rilate la komunikadon oni devus trakti kiel ĉefan evoluigan rimedon . . .". La komisionon de MacBride oni ne rigardu kiel rezulton, sed kiel komencon. Ĝiaj konkludoj montras, fakte, bazan zorgon, kiu estas unu fundamenta celo de Monda Komunika Jaro, nome Evoluigon de Komunikilaj Substrukturoj, kiu donas al ĉiu el ni, laboranta per naciaj komitatoj aŭ per la programoj de la koncernaj internaciaj organizaĵoj, eblecon partopreni en la evoluigo de la komunikilaj substrukturoj tiel necesaj por la ekonomia, socia kaj kultura evoluo de la popoloj, kaj de ĉiuj ni — individue kaj kolektive. Mi nun ŝatus diri ion pri la uzo de la lingvo. Mi havas du ĉefinteresojn pri la uzo de la lingvo: 1) la lingvo kiel la laborrimedo de internacia organizaĵo kaj 2) la lingvo kiel la komunika rimedo inter la korespondantoj en telekomunikaj sistemoj.

La lingvo estas necesa elemento en la komunikado. Kiel multe pli bona estus tergloba interkompreno, se ni havus unu solan lingvon! En la pasintaj kelkaj jaroj ni bonŝance vidis, aparte en landoj kun adekvataj edukaj rimedoj, ampleksigon de la instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj, kio estas laŭdinda klopodo de individuoj kaj certagrade de nacioj.

Sur la internacia nivelo ni vidas la ampleksigon de lingva kunlaboro per la pliigo de oficialaj kaj laboraj lingvoj, ekz. tiuj uzataj por certaj oficialaj publikaĵoj aŭ en konferenceja interpretado, la lingvoj, inter kiuj interpretistoj agas kiel perantoj en la dialogo kaj interkompreno ĉe apartaj kunvenoj de la internaciaj organizaĵoj kiel ITU. Kiel multe pli facile kaj malmultekoste estus, se ni havus nur unu solan komunan lingvon. Eĉ nun, kun la uzado de ses aŭ sep lingvoj, en variaj gradoj, en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj ankoraŭ troviĝas multaj gravaj lingvaj grupoj, kiuj devas uzi fremdan lingvon por komuniki en konferencoj kaj kunvenoj. Jen la graveco de la laboro, kiel tiu de via Asocio, por progresigi komunan lingvon.

Troviĝas, kompreneble, ankaŭ la problemo pri la uzo de la lingvo en telekomunikado. La principo, ĝis nun aplikata, estas, ke kompreno inter la korespondantoj sur la lingva nivelo estis tute ĉi ties afero, kondiĉe ke la kvalito de la kunligo estis bona. Ĉu tio daŭre validos en la modernaj telekomunikaj sistemoj, restas afero vidota.

Unu el la fruaj oficialaj rekonoj de Esperanto ja estis de la sama Internacia Telegrafia Unio, la antaŭula organizaĵo de la nuna ITU. Estas tre bela koincido, ke estis hungara propono, kiu rezultigis, ke la Internacia Telegrafia Konferenco, kunvenanta en Parizo, en 1925, akceptis Esperanton kiel t. n. „klaran" lingvon por la internacia publika telegrama servo.

Tio estis mejloŝtono kaj ĝi konservis la uzon de Esperanto por komunikado inter homoj, sed vi ĉiuj scias, ke ni nun vivas en mondo, kie lingvoj ekz. specialcelaj lingvoj, ofte bazitaj sur natura lingvo, estas uzataj por direkti maŝinojn. Tio estas temo, kiun vi ĉi tie diskutos dum la venontaj tagoj.

Multaj el tiuj lingvoj estas uzataj por apartaj celoj, kiel komputila programado, rego de ciferuzaj maŝinoj k. t. p. kaj la bezono de universala lingvo ĉi-rilata eble ankoraŭ ne sentiĝas. La pena serĉado por la ĝustaj vortoj kaj strukturoj, sub la neceso de eksperta kono de la kunteksto, verŝajne flankenigis okupiĝon pri skribado de la maŝine legeblaj instrukcioj en universala lingvo.
Sed tiu situacio validos nur tiel longe kiel la koncernaj taskoj estas rigardeblaj kiel fermitaj, apartaj operacioj. Kun voĉa rekonado kaj artefarita inteligento unuflanke kaj la uzo de publike alireblaj, komputile bazitaj, kaj aliaj informsistemoj en ekster-

lando per internacia telekomunikado aliflanke, venos tempo, kiam interparolado inter **homoj kaj maŝinoj devos esti bazita** sur pli universala kaj pli sisteme strukturita lingvo, ol la lingvoj, kiujn ni kutime uzas.

Vi komprenas, ke mi ne povas sugesti, ke tiun funkcion transprenu Esperanto, sed mi ja rekonas, ke Esperanto havas unikan pozicion inter la internaciaj lingvoj.

De la vidpunkto de universala uzo, estas du aspektoj, kie povus troviĝi eblaj lingvaj baroj al la uzo de novaj sistemoj. La unua estas povi paroli kun la sistemo, doni la ĝustajn instrukciojn kaj ricevi la deziratajn informojn. Tio implicas kaj povi trakti la informojn kaj povi rekoni, cele al elekto de la deziratajn informoj la plej taŭgan priskribilon por tiuj informoj.

La dua aspekto fakte rilatas al utiligo de la informoj el la komputa sistemo.

Estas facile imagi, ke la unua aspekto, la hom-maŝina dialogo, estas tiu, en kiu la lingva baro havos le plej grandan influon, ĉar efika dialogo signifas tempouzan funkcion. Ĉi-rilate oni devas rekoni, ke multe oni povas fari per simboloj, sed simboloj sur ekrano ne sufiĉas. Kompleze al la uzantoj, tiaj sistemoj devus utiligi sufiĉe altnivelan lingvajon por la dialogo.

Oni tuj vidas eblan rolon por universala lingvo; sed oni devas esti realisma; tia sistemo bazita sole sur universala lingvo, verŝajne ne estus efektivigebla propono jam en la komenco. Tial eble necesus iri pluan paŝon por dulingva aliro.

Nun kiam la kosto de komputado malaltiĝas, leviĝas la demando, ĉu estus efektivigeble provizi tiajn informsistemojn per enkonstruita tradukfunkcio, tiel ke almenaŭ la serĉ-dialogo povu okazi aŭ en la lingvo de la gastiga lando aŭ en internacia lingvo.

Mi ne scias, ĝis kiu grado vi jam pensas pri la uzo de Esperanto por hom-maŝinaj dialogoj en la reala kunteksto de la novaj internaciaj komunikaj servoj.

Vi, tamen, estas la ekspertoj. Vi unuiĝis ĉi tie por konsideri la utilon kaj la teknikajn aspektojn de la uzado de Esperanto en la hodiaŭa mondo, kio implicas uzadon ankaŭ en la mondo de modernaj telekomunikado kaj komputiloj. Vi scias la potencialon, kaj mi supozas, ankaŭ la malfacilojn esence proprajn en la uzado de Esperanto en hommaŝina kunteksto. Sed mi ja sentas, ke vi ĉiuj, via Asocio kaj la vasta anaro de esperantistoj tra la mondo povas fari tre konsiderindan kontribuon al la antaŭdiskuto de tio, kio sendube iĝos afero de konsiderinda intereso, se — kiel oni devas supozi, se oni kredas je teknika novigado — la hommaŝina dialogo iĝos grava faktoro en la internacia komunikado kaj transsendado de informoj.

Mi ne rajtas fini ĉi tiun demandon sen diri kelkajn vortojn pri la hom-maŝina dialogo mem. Mi scias, ke multaj el vi, kaj verŝajne tute prave, sentos sin iom maltrankvilaj pri la ideo, ke promesplena aspekto de la estonta uzo de universala lingvo kuntrenus interparoladon kun maŝinoj. Tio ja ŝajnas iom nehoma. Oni devus, tamen, rigardi tiajn maŝinojn pli kiel rimedo, per kiu homoj povas delegi certajn funkciojn al aparato. Ju pli bona estas la teknikologio, des pli la aparato povas fari kaj des pli praktika ĝi estos por ni. Spite al ĉio, ĝuste pri tio ni tendencas senti nin iom maltrankvilaj. Sed ni devas esti realismaj: kio eble ŝajnas stranga al unu generacio, tio eble ŝajnos tute normala kaj ĉiutaga al alia.

Sinjoro prezidanto kaj gesinjoroj, per ĉi tiuj pensoj, inspiritaj de la 21a jarcento, mi ŝatus gratuli vin pro viaj atingoj kaj deziri al vi ĉian sukceson en viaj klopodoj estigi pli bonajn komunik-kapablojn, tiel neprajn por ni ĉiuj.

La konsiderinda nombro de partoprenantoj de via 68a Kongreso, kiu prezentas plian agrablan koincidon de Hungario. UEA kaj la Monda Komunika Jaro kaj sekve ankaŭ ITU, certe ebligos al vi rompi la provokan taskon, kiun vi difinis al vi.

Budapeŝto, 31a de julio 1983

Violono

Vladimir Kaŝajev.

Al kontisto Vladimir Pavlović Kondraŝov estis donacita okaze de la naskiĝtago violono.

Adiaŭinte la gastojn, Vladimir Pavlović kolere batfermis la pordon kaj revenis en la ĉambron.

— Mi ja diradis al vi, — li grumblis al la edzino, — ke ne endas inviti tiujn Morozov!

Mi ja antaŭsentis, ke ili donacos iun abomenaĵon, kiun ili mem tute ne bezonas. Ilia filino ĉesis muzikekzercadi, la violono kuŝis ĉe ili senutile. Do, ili forpuŝis ĝin al mi. Kiel homojn mi ilin invitis, sed ili decidis ŝpari monon je donaco!

— Kion ni faru kun ĝi? — nekuraĝe demandis la edzino.

— Kion ankoraŭ? Sidiĝu kaj frotaĉu! „Lumas luno" aŭ lunaj sonatoj ekzistas ... Distru vin kulture!

— Eble, ni vendu ĝin?

— Vie opinias, ke iu ĝin aĉetos! Vastigu la buŝon! — mokis la jubileulo. — Provu iri al labrokantejo sekva semajne. Sed mi dubas, ke oni donos iom kontraŭ ĝi ... — li balancis la kapon, sendis diablon laŭ adreso de Morozov kaj enlitiĝis.

La sento, ke li estas moktrompita, ĉe Kondraŝov ne pasis ankaŭ sekvatage. Kaj kiam vespere lian hejmon vizitis unu el liaj kolegoj librotenisto Frolov, Vladimir Pavlović akceptis lin ne tro afable.

— Vi pardonu, — komencis Frolov, — por unu minuto, mi volas konsultiĝi pri la kvaronjara bilanco ... — sed subite lia rigardo haltis ĉe violono. — Kaj ... kio ĝi estas?

— Kio do! — murmuris Kondraŝov. — Ĉu vi mem ne vidas? Estas violono.

— Ĉu violono? — ekmiris la librotenisto. — Kies ĝi estas?

— Mia certe, kies ĝi povas esti? — respondis la mastro. —

— Interalie, ĉu vi ne volas ĝin aĉeti?

— Mi? Ne ... — kulpkonscie mallevis la okulojn Frolov. — Mi ne havas muzikkapablon ... Nu, vi pardonu min, mi ne malhelpu al vi. Alifoje mi vizitos vin — kaj li senbrue fermis la pordon post si.

Matene, kiam Kondraŝov venis al la laborejo, li eksentis estimajn rigardojn de la kolegoj, kaj la fama en la fako arogantulo ekonomiisto Makarenkov, salutante lin, ekstaris el post la toblo kaj ĝentile klinis la kapon laŭ la reguloj de l'etiketo.

En la fino de la semajno Vladimir Plavlović estis invitita al la ĉefo. Konversaciinte pri Mozart kaj Rimskij-Korsakov, la ĉefo interesiĝis:

— Nu, kiel statas viaj aferoj? Vi ial malgajas dum la lasta tempo. Eble, vi tro multe laboras, eble, la tempo mankas por la flankaj aferoj?

— Sed ne ... mi ... ne scias ... —— embarasiĝis Kondraŝov, ne komprenante, kion aludas la ĉefo.

Sed tiu amike frapis la ŝultron kaj ridetis:

— Ah, vi modestas tre! Jen kia vi estas fiera ... Unuvorte, se vi iam bezonas foriri hejmen pli frue, mi ne kontraŭas. Kaj mi ordonos, ke vi ne estu tro ŝarĝata per la laboro. La arto postulas estiman rilaton al si, ĉu ne? Mi tion ĉi bonege komprenas ...

Post tri tagoj en la entreprenejo, kie laboris Vladimir Pavlović, okazis sindikata kunveno. Finante sian raporton, la prezidanto de la sindikata komitato diris:

— Ni devas preni kiel ekzamplon kamaradon kontisto Kondraŝov, kiu ne nur modele laboras, sed aktive altigas sian kulturan nivelon, li dediĉas sian tutan liberan tempon al muzikado per violono. Kamarado Kondraŝov ne nur mem forlogiĝas je la arto, sed altiras aliajn anojn de nia kolektivo: ekzemple, kameradon Frolov li persvadis ankaŭ lerni muziki violonon.

Tiujn rimarkindajn personojn endas premii!

Post la kunveno Kondraŝov ricevis senpagan bileton por sanatorio.

Fotajo de Vladimir Pavlović kun la violono en la mano aperis en la urba jurnalo. La subskribo heroldis: „Muzikado violona estas hobio de kontisto Kondraŝov, unu el la plej bonaj laboruloj de nia urbo."

El la eseo, aperigita sube oni povas scii, ke la violono helpas al Vladimir Pavlović atingi pli altajn rezultojn en la laboro kaj sen ĝi li ne imagas sian ekzistadon.

Post tri monatoj Kondraŝov estis promociita kaj li komencis meti monon en la ŝparkason. Kaj post unu jaro, kiam estis ŝparita sufiĉa sumo, li iris al magazino por aĉeti por si harpon ...

(la rakonto aperis en „Literaturnaja gazeta") elrusigis E. S. Perevertajlo, USSR.)

Veturu al Pardubice: 23. 3. – 25. 3. 1984

Jam la sesan fojon en la ĉeha urbo Pardubice (100 km oriente de Praha) okazos Porpaca Renkontiĝo internacia, esperantista. La Van Renkontiĝon en la jaro 1983 partoprenis pli ol 300 personoj, kiuj diskutis, disputis sed ankaŭ ĝuis altnivelan kulturan programon, ekskursis, vizitis memorajojn.

La Vla Porpaca Renkontiĝo okazos de 23. — 25. 3. 1984.

La programo jam komenciĝos vendrede matene kaj finiĝos dimanĉe posttagmeze (23. — 25. 3. 1984). Kiuj poste ankoraŭ volas resti kaj viziti ekzemple Praha, havos helpon. La kostoj: Prezo por loĝado kaj manĝoj (du tranoktoj, manĝoj dum du tagoj 3 foje tage) Kcs 195,—. En la sumo jam estas enkalkulita enirbileto por balo, buso, suveniroj kaj dokumentoj.

Precizajn informojn pri programo oni sendos al tiuj, kiuj reale interesiĝas partopreni. Ĉeha Esperanto-Asocio, ČS—11001—Praha 1, Jilská 10.

El la Salutvortoj de Sándor Gáspár

En la nomo de la Prezidia Konsilio de Hungara Popolrespubliko, Hungaraj Sindikatoj kaj en la nomo de loĝantoj de Budapeŝto kun estimo kaj amo mi salutas ĉiujn partoprenantojn de la 68a UK. Mi deziras al la kongreso krean, rezultplenan kaj bonan laboron. Oni ne scias tutcerte, ĉu vere ekde Babelo ekzistas tiu ĉi lingva konfuzo en la mondo, sed estas fakto — ni estas dividitaj ankaŭ el lingva vidpunkto. Tio certe havis kaj havas kialon historian. Ni tutcerte scias la intencon de tiuj, kiuj — antaŭ preskaŭ cent jaroj — kreis la bazon de lingvo Esperanto. Kun certo ni asertas: ili intencis krei per la komuna lingvo ilon por pli bona interhoma kompreno kaj estimo. Ili intencis fari komuna posedaĵo ĉion mensan trezoron amasiĝintan en nia mondo.

Ni konsideras Esperanto-movadon unu el la plej noblaj kaj puraj movadoj de la lastaj jardekoj. Ĉiun honestan, bonintencan homon entuziasmigas dum laboro, se li/ŝi vidas la rezulton de sia laboro. Kulturantoj de Esperanto povas vidi la rezulton de sia laboro.

Ankoraŭfoje mi deziras al vi bonfarton en Hungario, kie ni klopodis certigi por vi ĉiun antaŭkondiĉon. Bonan sanon, bonan laboron kaj multe da sukceso!

El la salutvortoj de István Sarlós

La 4-an de aŭgusto en la Hungara Parlamentejo István Sarlós, vicprezidanto de la Ministro-Prezidio de la Hungara Popolrespubliko salutis la invititajn kongresanojn. Ni publikigas parton:

En la nomo de la Registraro de la Hungara Popolrespubliko mi salutas vin, reprezentantojn de la 68a UK de Esperanto.

Nia lando estas malgranda, sed ĝi havas grandan historian pasintecon, nia popolo havas gravajn virtojn, kaj ĝi havas ankaŭ grandajn perspektivajn planojn kaj programon. Unu el niaj celoj estas varti bonan amikecon kun la popoloj de la mondo. En la signo de tiu ĉi amikeco ni volus laŭeble kun la plej multaj homoj de trans de niaj limoj komunikiĝi, interŝanĝi pensojn kaj renkontiĝi. La hungara lingvo ne estas vicigebla inter la grandajn lingvojn de la mondo, sed ne ekzistas angulo en la mondo, kie ne vivas hungaroj. La tempestoj de la historio en la 20a jarcento kelkfoje ŝiris tiun ĉi popolon, kaj tiuj ventegoj portis iom da homoj de ĉi tie al multaj anguloj de la mondo. Tial por povi kontaktiĝi kun homoj de aliaj popoloj, por ni estas tre grave, ke laŭeble plej multaj hungaraj civitanoj parolu Esperanton. Kaj ni tre ĝojas, se la civitanoj de aliaj landoj kiel eble plej ofte nin vizitas por konatiĝi kun nia popolo, kun ĝiaj historio kaj nuntempo. Internacia konferenco ĉiam prezentas eblojn por tio, ke komenciĝu io nova. De tiu eblo certe doniĝas, ke la gvidantoj de la hungara movado post tiu ĉi kongreso instigu

ankaŭ aliajn ellerni Esperanton. Ofte mi aŭdis pri tio, ke inter la membroj de la internacia Esperanto-movado la kontaktoj estas multe pli striktaj ol ordinare inter homoj en la mondo. Tio manifestiĝas en reciproka helpo kaj kompreniĝo, kaj mi supozas, ke en la nuna momento la mondo bezonas tre multajn reciprokan helpon kaj kompreniĝon. Kaj mi deziras por ni mem kaj por ĉiuj popoloj de la mondo, ke ankaŭ per la helpo de la Esperanto-movado ĝi ricevu kiel eble plej multe el tiu interkompreniĝo. Mi deziras, ke en ĉiuj anguloj de la mondo sentiĝu tiu humanismo kiun ankaŭ vi reprezentas.

Kelkaj faktoj pri la 68a UK

La 68a UK havis 199 oficialajn programerojn. Oni aŭskultis 30 prelegojn pri la kongresa temo, dum 17 horoj.
La Komitato de UEA kunsidis 11-foje, sume 16 horojn.
Kuba Esperanto-Asocio fariĝis la 45a Landa Asocio de UEA.
Enspezo de la libroservo de la 68a UK estas 500 mil forintoj. Du trionojn de tiu ĉi sumo la kongresanoj elspezis por libroj.
Ekskursa Servo vendis 6842 biletojn por diversaj turismaj aranĝoj. La lasta kongresnumero estas: 5046.
Kongresa Budapeŝta Informilo, kies rubriko estis Kongresa Kuriero, aperis 6 foje po 2 paĝoj, en 5500 ekzempleroj.
Pokalo FYNE estis transdonita dum la Fermo al reprezentanto de Ĉina Esperanto-Ligo.
Ĉe la fino de la Fermo de la 68a UK d-ro Endre Baráth, prezidanto de LKK solene transdonis la simbolan kongresan flagon al s-pro W. du Temple, prezidanto de la LKK de 69a UK de Esperanto, Vankuvero, Kanado.

TRADUK–KONKURSO — Tasko 5

Kunstpreisträger 1983

Allzu umfangreich ist die Liste der Rollen, die Jörg Gudzuhn in den knapp sieben Jahren seiner Zugehörigkeit am „Maxim-Gorki-Theater" spielte. Allein die Aufzählung seiner wichtigsten Aufgaben belegt, über welche Vielseitigkeit und Wandlungsfähigkeit dieser profilierte Darsteller verfügt — eine breite Palette der verschiedensten Charaktere unterschiedlichen Alters, die den jugendlichen Liebhaber ebenso wie den Mann mittleren Alters und die komisch-tragischen Figuren einschließt.

Sein Debüt am „Maxim-Gorki-Theater" gab er 1975 (noch als Gast) als Gallikan in „Rosie träumt" von Peter Hacks, unter der Regie von Wolfram Krempel, mit dem er auch wenig später die männliche Titelrolle in „Kasimir und Karoline" von Horvath erarbeitete. Drei äußerst unterschiedliche Aufgaben in Inszenierungen von Thomas Langhoff — Johannes Vockerat in „Einsame Menschen", Werschinin in „Drei Schwestern" und Nick Bottem in „Ein Sommernachtstraum" — gaben ihm die Chance, sich als Schauspieler immer wieder neu auszuprobieren. Und er gibt sich nicht zufrieden mit dem Ergebnis, das er in den Proben bis zur Premiere erreicht. Das ist an allen seinen Rollen mehr oder weniger ablesbar,

am stärksten vielleicht aber in „Nachtasyl", wo er als Satin versucht, dieser komplizierten Figur — natürlich in Absprache mit Regisseur Albert Hetterle — immer neue Züge, Varianten abzugewinnen. Sein McMurphy in „Einer flog über das Kuckucksnest" brachte ihm 1982 den Berliner Kritikerpreis für die beste männliche Darstellung ein. Unter der Regie von Winkelgrund spielt er in der Studiobühne die Titelrolle in Athol Fugards „Dimetos". Seine nächste Aufgabe ist der junge, in marxistische Theorien verstrickte Klempner Covey in „Der Pflug und die Sterne" von O'Casey.

Durch seine starke Beanspruchung am Theater ist er bei Funk, Fernsehen und DEFA ein seltener Gast. So ist sein Franz Xaver Stannebein in dem DEFA-Film „Das Luftschiff" wohl seine bisher größte Rolle außerhalb des Theaters.

Kondiĉoj

Partopreni povas unuopuloj kaj kolektivoj. Ni distingas la plej bonan solvon por ĉiu unuopa tasko kaj tiun por la tuta jaro per libropremioj. La tradukoj estu tajpitaj kun 3 bone legeblaj kopioj kaj sendendaj al Dieter Berndt, 1020 Berlin, Berolinastr. 2. La alsendo okazu ĉiam ĝis du monatoj post la apero de la unuopaj numeroj. La kontribuojn oni ne resendas al la sendintoj. Ĉiu partoprenanto ricevas informon pri la rezultoj. Tiuj ĉi kondiĉoj anstataŭas la presitajn en „der esperantist" 1/83, p. 8.

Chandra kaj UEA

Antaŭ la 68a UK, la 27-an de julio 1983 en Budapeŝto okazis renkontiĝo de reprezentantoj de UEA, d-ro Renato CORSETTI, vicprezidanto kaj d-ro Humphrey TONKIN, estrarano pri eksteraj rilatoj kun s-ro Romesh CHANDRA, prezidanto de la Mondpaca Konsilio, kiu feriis en Hungario.

La renkontiĝo, kiu estis aranĝita laŭ invito de s-ro CHANDRA, estis okazo por reciproka informigo kaj por interŝanĝo de opinioj pri eventuala kunlaboro, interalie en kunligo kun la Internacia Jaro pri Paco 1986 kaj en la agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj. S-ro CHANDRA esprimis sian favoran opinion pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj pri ĝia kontribuo al kompreniĝo inter la homoj. Li emfazis la gravecon de komuna lingvo: „Necesas komuna dialogo por solvi mondajn problemojn prefere ol milito".

Romesh Chandra al la MEM-kunveno

Tre estimataj geamikoj!

Mi salutas la partoprenantojn de la Budapeŝta renkontiĝo de Mondpaca Esperantista Movado, kaj mi deziras multe da sukceso por via laboro en la nomo de la Monda Packonsilantaro kaj de ĝiaj 141 pacmovadoj, kiuj ĉirkaŭprenas jam la tutan terglobon. Ĉiam estas festo en la vivo de iu organizo, kiam ĝi

rememoras pri signifaj datrevenoj, jubileoj. Tiel estas ankaŭ en la kazo de la 30jara datreveno de MEM. Tiu ĉi okazo samtempe estas momento plena de respondeco. Ni devas retrorigardi al la vojo, al la laboro ĝis nun faritaj kaj ni devas decidi pri la agoj en la futuro, kiuj neniam povas esti pli malmultaj ol la antaŭaj. Speciale ne nuntempe, kiam la homaro atingis la plej danĝeran etapon de sia historio. „Flanke de la homaro nur ununura paŝo al la malbona direkto kaj ĝi nerenverseble falos en la abismon de la atommilitos" — emfazas la „alvoko" de pli ol 3000 partoprenantoj de la Mondrenkontiĝo de Prago, analizante la taskojn de la luktado por la paco, por la vivo, kontraŭ la atommilito. Multaj scias jam, ke la vetarmado, speciale la atomarmado atingis tiajn mezurojn,, de kie jam apenaŭ estas revenvojo. La planita lokigo de la usonaj raketoj en Eŭropo signifus tian spiralon de la armado, kies konsekvencoj ne plu estas videblaj. Kaj en ĉi tiu kazo oni devas konsideri la eblecon ne nur de la intenca, sed ankaŭ de la hazarda katastrofo.

Kies intereso estas ĉio ĉi? Kiuj profitas el ĉi tio? Kiuj respondecas pri tio ke en niaj tagoj unuavice la vetarmado estas kaŭzo de problemoj, kiuj montriĝas en la ekonomia kaj alidirekta evoluo de la homaro — speciale en la evolulandoj.
Ĉiam pli multaj rekonas la danĝeron de la nuklea milito kaj ĉi tio ekmovas amasojn, faras la agadon de la pacmovado pli energia — ja la homoj volas vivi, pli inde je homo!

Mi estas konvinkita, ke via komuna tasko estas konsciigi al ĉiuj la teruran danĝeron, klarigi al ĉiuj ke ne sufiĉas nur scii pri ĉi tio, sed ni devas ankaŭ agadi por la pli bona kaj inda vivo — kaj agadi kune!

Ĉu ekzistas pli eminenta ilo en niaj tagoj por ĉi tiu ne facila laboro ol la lingvo Esperanto, kiu plifaciligas la komunikadon, la internacian kompreniĝon — kiu estas komenco de ĉiu kunlaboro. La Monda Packonsilantaro estas fiera pri tio ke la esperantistoj troviĝas en ĝiaj vicoj kaj la kunlaboro inter niaj organizoj estas elstara. Ĝuste antaŭ dek jaroj ni konceptis la skribe fiksitajn principojn de nia kunlaboro.

Ĉi-okaze mi aparte deziras diri dankon al d-ro Imre Pethes, prezidanto de via organizo pro lia agado en la intereso de pli striktaj kontaktoj inter Monda Packonsilantaro. Mnodpaca Esperantista Movado kaj Universala Esperanto-Asocio. La Monda Packonsilantaro pretendas vian helpon kaj deziras apogi sin sur via laboro.

Ni faru ĉion kune por la paco, por la pluvivado de la homaro!

Nova Estraro de UEA

La Komitato de UEA elektis novan Estraron. Ĝi havas naŭ membrojn.
Prezidanto: Grégoire Maertens
Vicprezidantoj: Prof. d-ro Humphrey Tonkin
Yosimi Umeda
Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felsö
Alfabeta listo de la estraranoj kaj iliaj taskoj:
D-ro Renato Corsetti, Italio, landa agado; planado
D-ino Barbara Despiny, Francio, junularo; parto de la eksteraj rilatoj
Roland Lindblom, Svedio, kongresoj
Grégoire Maertens, Belgio, financoj kaj administrado
Baldur Ragnarsson, Islando, kulturo kaj edukado
Petar Todorov, Bulgario, faka agado
Prof. d-ro Humphrey Tonkin, Usono, parto de eksteraj rilatoj
Yosimi Umeda, Japanio, informado.
La tuton kunordigas d-ino Flóra Szabó-Felsö, Hungario, kiel ĝenerala sekretario.

D-ro O. Becker, Zittau

Agrabla feriado kaj lernado en Pisanica

Pasintajn monatojn en la esperanta gazetaro aperis kelkaj artikoloj pri la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) en Pisanica, ekz. „der esperantist" 115 (5/1982), „Budapeŝta Informilo" 3, 4, 5 (1983). Foto de la impona konstruaĵo de IEK estas presita sur la frontpaĝo de BI 4 (1983). Pli detalajn informojn pri la kursejo mi akiris pere de la materialo, sendita al mi de s-ro Ch. Ignatov, Berlin, PK 315. Scivoliĝinte, mi mem deziris konatiĝi kun la laŭdegita kursejo kaj utiligi ĝiajn eblecojn por lernado kaj feriado. Pro tio mi decidiĝis pasigi la ĉi-jaran libertempon en Bulgario kune kun mia edzino, kiu ne parolas esperanto.

La Internacia Esperanto-Kursejo troviĝas en la vilaĝeto Pisanica proksime de la urbo Smoljan, situanta en Rodopi,montaro. Ĉiutaga sunbrilo kaj samtempe freŝa kaj pura aero, jam influata de Egea maro, ĉarmaj herbejoj kun odorantaj floroj, ombroplenaj arbaroj sur la montoj kaj pitoreskaj montopintoj estigis ne forgeseblajn impresojn pri la ĉirkaŭejoj de la vilaĝeto. Sunbanadoj sur la herbejoj, promenadoj kaj migradoj tra la belega ĉirkaŭo faris bonan apetiton kaj agrablan laciĝon, pro kiu ni ĉiam volonte siestis post la bongusta tagmanĝo.

La kursejo fakte estas moderna hotelo, apartenanta al la Bulgara Esperanto-Asocio. Gi enhavas 210 litojn en du-, tri-, kvar- kaj seslitaj ĉambroj kun duŝejoj kaj necesejoj en ĉiu ĉambro. Krome en la kursejo troviĝas manĝejo, diskoteko, biblioteko, lingvo-laboratorio kaj diversaj klasĉambroj. Tial ne nur estas bonegaj eblecoj por feriado, sed ankaŭ por instruado kaj lernado. Spertaj geinstruistoj gvidas lingvokursojn por komencantoj kaj por progresintoj. Tre rekomendinde sed ne devige estas, trapasi ekzamenon fine de la vizitita kurso. Mi mem partoprenis kune kun bulgaraj gesamideanoj kurson, emfazantan la gramatikaĵojn de Esperanto, kaj mi poste sukcesis la ekzamenon. Koran dankon al nia bulgara instruistino pro liaj klopodoj! Krom tio interparoladoj kun geespejanka. Ni ankaŭ veturis al Smoljan, al la pis al mi plibonigi miajn lingvokonojn.

„Matene lerni — posttagmeze ferii" estas slogano en la kursejo. Krom la jam menciitaj sunbanadoj, promenadoj kaj migradoj ni ankaŭ ekskursis per propraj aŭtobusoj de la kursejo. Ni vizitis la faman vintrosportan centron Pamporovo kaj ni suprenveturis per seĝlifto la tie troviĝantan montopinton Sneŝanka. Ni ankaŭ veturis al Smoljan, al la administra centro de la regiono. En la nova parto de la urbo oni konstruis modernajn loĝkvartalojn kaj tie ankaŭ troviĝas teatro, pentrajgalerio, muzeo, planetario, grandmagazeno kaj administraj konstruaĵoj. En la planetrario dum la prezentado de la arta ĉielo ni aŭskultis intersan esperantan paroladon pri astronomio. Ni ankaŭ ekskursis al la vilaĝo Ŝiroka Laka, kie troviĝas belegaj malnovaj dometoj, kiuj estas konstruitaj en antikva stilo kaj protektataj kiel konstrumonumentoj.

Hejmenvojaĝante ni interrompis la veturon en la multjarmila urbo Plovdiv. Samideano gvidis nin tra la malnova parto de la centro de Sudbulgario. Li montris al ni belajn antikvajn domojn, ombrajn kortojn, la parte fositan romian forumon kaj la antikvan teatron de Philippopolis. Sekvan tagon ni reflugis el Sofio al Dresden kaj bonfarte kaj kontente ni alvenis en nia hejmurbo Zittau.

Travivinte tre interesajn kaj ripozigajn tagojn en Pisanica, mi konstatas, ke la Internacia Esperanto-Kursejo vere estas vizitinda kaj mi rekomendas al ĉiuj geesperantistoj: utiligu tiun ĉi okazon por ferii kaj samtempe plialtigi viajn lingokonojn.

Informojn pri la eblecoj viziti la kursejon kaj pri la financanj problemoj por GDR-anoj donas s-ro Christo Ignatov, reprezentanto de IEK en GDR (1020 — Berlin, Postfach 315).

Juna amiko reaperos

Post pli ol unujara paŭzo reaperas konata internacia lerneja revuo JUNA AMIKO eldonata far HEA. Kiel nova redaktoro estis komisiita s-ro Oldrich Knichal (Budaörs, Patkó u. 3. II. 19, H-2040, Hungario).
Pedagogoj, verkistoj, ĵurnalistoj kaj ĉiuj ĝisnunaj kunlaborantoj estas petataj kontribui per interesaj legaĵoj konvenaj al orientiĝo de la revuo kaj lingve adaptitaj al la bezonoj de la legantoj kaj konsiderante la vortprovizon ĝis 1000 morfemoj.

Konatiĝu: GDR

Tiel nomiĝas la dediĉita al Germana Demokratia Respubliko ekspozicio, kiun aprile de 1983a jaro organizis en sia ejo komsomola komitato kun la Esperanto-komisiono ĉe la Uzbeka Amikeca Asocio.

Eksponataj materialoj: afiŝoj, afiŝoj, fotoj, prospektoj, bildkartoj, pri komercaj, ekonomiaj kaj kulturaj kontaktoj de GDR kun aliaj socialismaj landoj, precipe kun Soveta Unio. Unu el la bele ornamitaj standoj de la ekspozicio, havanta la titolon „La ĉefurbo de GDR — Berlin", konatigas nin kun la urbo, ties vidindaĵoj, atingoj de la urbologantaro en diversaj agadkampoj. La ekspozicion, funkciintan dum unu monato, vizitis kaj rigardis kunlaborantoj de la instituto, oficistoj kaj laborantoj de najbaraj kaj kolegiaj organizoj, gelernantoj de la meza lernejo, patronata de la instituta komsomola komitato.

Ĉi-ekspozicio estas la unua, kiu komencas la grandan ciklon de ekspozicioj, dediĉotaj al landoj de socialisma komunumo.

Vladimir Masalkin, sekretario
de Taŝekenta Esperanto-Klubo

Jam dua fojo:

Esperanto-teatroj en Budapest

Ĝi okazis de la 18. — 27. 3. 1983 en Budapest en la teatro Radnoti. Ĉiutage je la 19a horo oni prezentis teatraĵojn aŭ kulturprogramojn en Esperanto.

Dum la malferma vespero de la Internacia Renkonto de Esperanto-Teatroj la hungara esperantista aktoraro (Hungara Esperanto-Teatro) prezentis al la publiko du novajn unuaktaĵojn.

En „La Mortintoj de Spoon-River" Edgard Lee Masters, la verkisto, revokas „finitajn" homsortojn, kreinte per tio tragikan provon de la lasta konfronto. Kia estas la plena vivo? Kio estas la misio de la homo sur la tero? La teatraĵo respondis simple tiujn demandojn. La renoma aktoraro (Ildikó Pécsi, Emil Keres, Kati Berek, Denise Kárpáti, Zsigmond Fülöp kaj István Wohlmuth) inde meritis la aplaŭdon de la publiko.

En la dua unuaktaĵo „La lasta magnetofonbendo de Krapp" Samuel Becket analizas kvazaŭ plu la filozofiajn tezojn de Masters. Ankaŭ ĉi tie temis pri retrorigardo al plenumita vivovojo. La esenco sugestis: dum vi vivas, ni havas eblojn varti iluziojn, konstrui aerkastelojn por ni mem. Kálmán Szabó eminente surscenigis la figuron de Krapp.

Pri la „Profeto" de János Elem jam oni recenzis kelkfoje, ja la teatraĵo alportis sukceson ne nur en la pasinta Festivalo, sed poste ankaŭ en Antverpeno, dum la 67a UK. Jen koncize la enhavo de la gaja, satire ironia historio. Dek laciĝintaj homoj, reprezentantoj de diversaj sociaj tavoloj, serĉas kun espero la savon en la program-oferto de Turisma Oficejo „Sed ni same". Ili volas vidi multon el la mondo, sed la Oficejo lasas la societon por du semajnoj meze de iu dezerto. Du semajnoj estas je la dispono de la homoj tute fermdaj unu al la alia, por ke ili malkovru la naturon, retrovu la simplajn homajn kontaktojn, la karakter-riĝigan efikon de komunumo, por ke ili retrovu sin mem.

Reĝisoris la teatraĵon László Romhányi. La rolantoj jam estas bone konataj por la budapeŝta publiko: Csilla Herceg, Józsa Hacser, Denis Karpáti, Zsigmond Fülöp, Lajos Tándor, Richárd Horváth, Ildikó Pecsi, István Wohlmuth, Kálmán Szabó kaj Emil Keres.
En la lasta semajno ŝanĝiĝis la programo de la teatra renkonto. La jubileanta Bulgara Esperanto-Teatro — nun jam 25-jara — surprizis la budapeŝtan publikon per bona komedio de Benedetti „La rozoj". La tri protagonistoj (Belka Beleva, Anani Anev kaj Mihail Cobanov) profesi-nivele prezentis tiun gajan kaj spritan, leĝeran teatraĵon.

Pri kulturo en Opava

La V-a Esperatista Kultura Festivalo, Opava, Ĉeĥoslovakio, 16. — 18. 9. 1983, okazis en la kadro de kultursemajno memore al la 25a datreveno de la morto de poeto Petr Bezruĉ, (Sileziaj Kantoj).

Per solena inaŭguro de ekspozicio komenciĝis la festivalo la 16an de septembro, vespere. Ĝi prezentis karikaturojn de Pavel Rak. La esperantistoj jam konas la artiston el la ĉeĥa E-gazeto „Starto".

Sabaton antaŭtagmeze literaturistoj el Ĉeĥoslovakio, Pollando, Bulgario kaj GDR havis kaj kaptis la eblecon, prelegi pri la scienco kaj arto de tradukado. Oni prilumis tiun laboron el preskaŭ ĉiuj vidpunktoj, sed fine por la komencanto rezultis: antaŭ tradukado unue legu cent librojn kaj pli (Jiři Kořinek). Laŭdinda entute, tiu seminario. Oni esperu, ke pli ofte renkontiĝu en simila kadro seriozaj laborantoj sur tiu kampo.

Teatro, recitado, muziko, kantado — gaja kaj serioza — oni prezentis sin ekde sabato posttagmeze ĝis dimanĉo tagmeze: Moderna bardo (Pollando), operkantisto (Silezio), profesia kaj laika teatroj (Bulgario, Ĉeĥio), recitantaj kaj kantantaj infanoj, ĥoro de instruistinoj (Silezio), ĉarma gvidantino tra la programo . . . Tre altkvalita, amuza kaj impresa estis la programo.

La amika vespero montris sin kiel kutimaj festoj ĉe niaj najbaroj: viv- kaj muzikplena, plena da gajaj babilado kaj kantado, da viglaj modernaj popolaj (ĉardaŝo en tiu regiono) dancoj, kaj iam tiam ankaŭ krioj pro ĝojo.

Cetere, hazardaj vojgvidantoj en Opava (ĉirkaŭ 50 000 loĝantoj, iama ĉefurbo de Silezio) ĉiam montris sin tre informitaj pri la V-a E-festivalo en la kadro de la Bezruĉ-semajno. Ankaŭ tio estas merito de la loka E-grupo.

Monika Ludewig

Esperantisto el Mongolio

18jara junulo el Mongola Demokratia Popola Respubliko serĉas kontakton kun esperantistoj el Germana Demokratia Respubliko kaj aliaj landoj. Li interesiĝas pri astronomio, biologio, bioniko, kibernetiko kaj botaniko. Li ŝtatas legi scienc-fikciajn romanojn kaj volus havi librojn pri kaj en Esperanto. Aparte lin interesas Mondpaca Esperanista Movado kaj universala Esperanto-Asocio. Interesuloj kiuj povus sendi al li librojn kaj ŝatus korespondi kun li skribu al: TS. Batzaya, Ulan Bator, Central Post, Post restante.

IMEK — ĉifoje en Proprad

Post tiuj en Kraków (77), Hómezövásárhely (79) kaj Ruse (81) ĉifoje la IV-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco estas aranĝita en Proprad, ČSSR.

Denove sukcese evidentiĝis interorganiza preparado de nia fakkonferenco:

La 80 medicinistojn el ok landoj gastigis de 25-a ĝis 29-a de julio 1983 Universala Medicina Esperanto-Asocio, la medicinaj sekcioj de Asocio de Esperantistoj en SSR kaj de Čeha Esperanto-Asocio kaj Substrata Esperanto-Klubo de Proprad.

La solenan malfermon en klubejo de la vagonfabriko de Proprad, kiu pruviĝis tre taŭga konferencejo, ĉeestis oficialaj reprezentantoj de la urbo Proprad: Esprimante sian simpation kaj alttakson al nia faka movado salutis la konferencanaron la estro de la Kulturfako de la Distrikta Nacia Komitato, Jozef Búda kaj la estro de la Sanitara Fako de la Distrikta Nacia Komitato, d-ro Dušan Blablo. La salutintaj reprezentantoj el Bulgario, ČSSR, FRG, GDR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Svedio esprimis sian profundan kontenton pri la tradiciiĝo de nia institucio IMEK kaj optimisme rigardis la futuron de la medicina faka agado.

La nunjaraj konferencaj ĝeneraltemoj estis 1. La aplikado de Esperanto en la medicino en la Jaro de Komunikado kaj 2. La problemoj de laborhigieno en sanitarejoj.

Unuafoje la fakprelegoj ne estis aŭskultitaj kaj diskutitaj en aŭditorio: sidante ĉirkaŭ tabloj en tute konvena salono la kolegaro ĝuis pli intiman atmosferon. La prezentado de 32 senescepte bonnivelaj kontribuaĵoj — kun diapozitivoj kaj aliaj ilustraj materialoj — estis sekvita per laŭdinda atento kaj disciplino, kio trovas sian kaŭzon en la kolegeca-familieca etoso kaj en la tre interesiga enhavo de kvazaŭ ĉiuj prelegoj.

La faka kaj la lingva kvalito de la prelegoj, kontribuitaj far ses gekolegoj de Medicina Fakrondo de GDREA, estis bona kaj tre bona. Tial nome de Centra Estraro de GDREA kaj de la estraro de MFR al la prelegintaj gekolegoj estas esprimata nia kora danko!

Prelegis d-rino Irmgard Bärenz, Senftenberg, pri „Ortopediaj problemoj por laboruloj en sanitarejoj", d-ro Klaus Bochmann, Bräunsdorf, pri „Malsano-malsaneco" — medicinteoriaj kaj filozofiaj problemoj", d-ro Horst Köther, Wolmirstedt, pri „Apero de infektoj en bovaj gregoj pro tuberkuloze malsanaj bestflegistoj", d-ro Frank Nitzsche, Karl-Marx-Stadt, pri „Laboro de medicinistoj en GDR kaj komputera analizo", kolegino Herta Zemlin, Magdeburg, pri „Kelkaj psikologiaj aspektoj ĉe la prizorgado de infanoj kun hematologiaj kaj onkologiaj malsanoj" kaj d-ro Giso Brosche, Rückersdorf, pri „Zoonozoj kiel profesiaj malsanoj en GDR".

Ni deziru, ke IMEK-prelegoj estu aŭ 1. lingve plus enhave modelaj, 2. prezentantaj interesajn gravajn novaĵojn aŭ ili 3. pensigu ĉiujn aŭskultantojn pro ĝenerale valora enhavo. Tion ni ĝenerale dum neniu IMEK povis koincidigi kun la ĝeneralaj konferenctemoj. Male: La kolegoj pli kaj pli sekvis la ĝeneralan deziron kaj iom neglektis la certkaŭze gravajn konferenctemojn.

Kiel lingve-plus-fake modelan prelegon mi ekzemple menciu „Intenca kaŭstikizado de la vidorgano kaŭzita per polvo de anilinkrajono" de d-rino J. Molnár-Farkas, Hungario. Atentego regis ekzemple dum la novaĝsciigaj kontribuoj „Influo de la metilalkoholo sur psikopatologio de alkoholuloj" de kolegino Tjuran Omer, Bulgario, „La iliopsoas-muskolo" de kolegino Lilian Kunllenberg, Svedio kaj „Seksaj pasioj kaj nova sindromo de imuneca difektiĝo" de kolego Hubert Schweizer, FRG.

Kiel nepre ĉies intereson kaptantan prelegon mi ekzemple nomu „Malsano-malsaneco . . ." de d-ro Klaus Bochmann, GDR, kaj „Rilatoj de psikosomatiko kaj psikoenergetiko" de kolego Teodor Rosinský. Menciindas, ke krom hommedicinistoj ne nur prelegis stomatologoj, sed ankaŭ kvar veterinaroj, kiuj ĉefe informis pri zooantroponozoj.

La diskutoj ĉiam estis viglaj kaj profundaj. Estas nenecese atentigi kaj memorigi ĉi tie pri nova pruvo, ke Esperanto taŭgas por la faka aplikado; sed vole-nevole aperis tiu ĉi konsciajo dum oberservo de riproĉa disputa-atako inter la kolegoj prof. d-ro Kiril Popov kaj Hubert Schweizer. Ĉiuj spertis, ke per Esperanto do esprimeblas ĉia emocio, eĉ dum faka pensinterŝanĝo.

Kvin bestkuracistoj el kvin landoj dum IMEK IV detale diskutis pri la ebloj iam fondi veterinaran sekcion de UMEA. Estas decidite, ke post dujara prepara laboro en IMEK V estu — se eble — fondata la suborganizajo. Okazis dum IMEK IV ankaŭ la tradicia kunsido de la prezidantoj de la landaj medicinistaj fakgrupoj resp. de la UMEA-sekcioj kaj de landaj reprezentantoj. Grava rezulto de la interkonsilo estis Malferma Letero al ĉiuj gekolegoj esperantistoj-medicinistoj celanta pliaktivigon de nia faka agado.

La tradicia vizito al urba hospitalo ankaŭ en Proprad havis altan praktikan valoron por la internacia medicinistaro.

La ampleksa ekskursa programo prezentis al ni la pitoreskan naturon de Altaj Tatroj kaj atestilojn de kultur- kaj konstruhistorio: ĉiuj detale ĝuis la belaĵojn de Smokovec, Štrbské plŝeo, Tatranská Lomnica, Kežmarok kaj Levoča.

La emociigaj folklora kaj danca vesperoj restos en la memoro de la konferencanoj.

La bona organiziteco de la fakkonferenco, la helpemo kaj ageno de la kolegoj inĝ. Zvara kaj dro Grenda kaj de multaj nun ne nomataj, la alloga faka kaj kadra programoj kaj ĉies bonhumoro garantiis denove la kutiman kolegecan IMEK-etoson.

Ankaŭ IMEK IV fariĝis tre valora gajno por ĉiuj partoprenintoj kaj signifa evento por la faka Esperanto-movado ĝenerale.

La gekolegoj el GDR tre kore dankas siajn slovakajn kaj ĉeĥajn gekolegojn!

Konstanta Internacia Kvalifikejo (KIK)

De la 9a ĝis la 22a de aŭgusto 1983 okazis en Bulgario, en Varna, la unuan fojon seminario por kadroj de E-Asocioj el socialismaj landoj. Partoprenis ĝin 45 funkciuloj de la E-Asocioj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando, Vietnamio kaj Bulgario. La instruprogramo de la seminario kontentigis ĉiujn. Ni aŭskultis prelegojn pri la nuntempa lingva situacio en la mondo, pri tendencoj de ĝia evoluo kaj ŝanĝiĝo, pri la eblecoj de sociutila apliko de Esperanto, pri la apliko de Esperanto en la scienco. Aliaj prelegoj traktis la rolon de Esperanto en la pacbatalo, la historion de la laborista E-movado, la fakajn E-organizaĵojn kaj instancojn. La partoprenintoj ricevis bonan superrigardon pri la internacia strukturo de la nuntempa E-movado. Pliaj prelegoj traktis problemojn de la E-metodiko, principojn kaj problemojn de informado kaj argumentado pri internacia lingvo, pri kunlaboro de la E-organizaĵoj de la socialismaj landoj. Demandoj de la plibonigo de la grupkunvenoj estis diskutataj kaj problemoj de la praktika organizado kaj gvidado de la E-movado sur loka kaj regiona nivelo. La oferto de la prelegoj donis al la aktivuloj sufiĉe da eblecoj por plialtigi sian politikan, lingvan kaj fakan scion. Ili estis valoraj kaj enhavriĉaj kaj donis al ĉiu „KIK-ano" multnombrajn instigojn por agadi ankoraŭ pli celkonscie kaj pli altnivele en la E-movado. Per tio la seminario iĝis vojmontrilo al kleriĝema esperantisto. Mi kredas, ke mi povu paroli en nomo de ĉiuj geparto-prenintoj, esprimante nian dankegon al tiuj, kiuj ebligis kaj nian partoprenon kaj la organizadon de la seminario. Specialan dankon al la lektoroj: Milan Zvara, d-ro Vlastimil Novobilsky, Anani Anev, Nikola Aleksiev, Canko Murgin, Ljubomir Mihajlov, Donĉo Hitrov, Dimitar Papazov kaj Marin Bacev. Ili sciis kontribui elstare al plialtigo de politika, lingva kaj faka nivelo de la E-aktivuloj. Lerte ili stimulis al diskutado. La finon de la seminario formis ekzameno, traktinta la diversajn prelegojn. Fiere ni akceptis la „diplomojn", kaj tio estu por ni devoligo apliki nian akiritan scion. 1984 okazos dua seminario, dum aŭgusto aŭ septembro. La restado kostos ĉ. 800 markojn pageblajn en GDR, aldonendas vojaĝkostoj. Interesuloj skribu al GDREA, kiu konfirmos la portopreneblecon.

Bärbel Kulisch

3-a Lernejana Esperanto-Renkontiĝo (LER)

Tardiciiĝis jam la renkontiĝo de lernejanaj Esperanto-laborgrupoj el lernejoj, pioniraj domoj kaj kluboj de Kulturligo.

Ĉijare partoprenis 37 infanoj kaj gejunuloj de la kvara ĝis naŭa klasoj el la distriktoj Suhl, Erfurt, Dresden, Leipzig, Potsdam, Frankfurt/Oder, Neubrandenburg kaj Rostock. (11. — 15. 7. 1983)

Ĉe la lago Straussee bele situas la turisma stacio, kie la pioniroj kaj LER-anoj travivis belajn feriajn tagojn, uzinte la lingvon Esperanto. Ĉeestis ankaŭ du gastoj. La veteranoj de la Laborista-Esperanto-Asocio Werner Habicht kaj Ludwig Schödl rakontis kiamaniere ili uzis Esperanton por la celoj de la laborista movado.

„Mi deziras, ke ĉiuj infanoj de la mondo vivu en paco kaj feliĉo."

Tiu fina frazo de ĉiuj leteroj de la partoprenantoj al siaj geamikoj en aliaj landoj montras, ke ili bone komprenas kaj daŭrigas la tradiciojn de la Laborista Esperanto-movado, speciale de ĝia pionira movado. La plej multaj junaj geesperantistoj jam regule uzas Esperanton por korespondi kun samaĝuloj en la socialismaj landoj. En la poŝtoficejo de la amikeco en la Pionira Palaco la leteroj estis forsendataj plejmulte al Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio. Tiuj leteroj temas pri la vivo de la skribintoj, pri iliaj familianoj kaj amikoj, pri iliaj hejmurboj kaj la travivaĵoj dum la renkontiĝo kaj en la kampadejo, en Berlin kaj en Pionira Palaco. Per tiuj leteroj la plej junaj geesperantistoj kontribuis al disvastigo de konoj pri nia socialisma hejmlando eksterlande. Pruvis la bone skribitaj leteroj same kiel ankaŭ la konkurso de la talentuloj rimarkindajn rezultojn de la Esperanto-lernado. La instruado de sinjoro Ebert, sinjorino Boller kaj sinjoro Birnbaum kontribuis al evoluigo de la lingvoscio kaj parolkapableco. Senĉese ĉiuj ĉasis verdajn steletojn, kiujn la grupestroj disdonis por ĝusta Esperanto-interparolado dum la libera tempo. Al ĉiuj plaĉis tiu ĉasado. Grandan ĝojon faris ankaŭ la teniskonkurso, nokta migrado, desegna konkurso, banado kaj naĝfesto. Sed dum tiuj belaj okupoj ili ne forgesis la infanojn, kiuj suferas pro la krimoj de la imperiismo. En la Pionira Palaco ili vendis amatore metiitajn ajojn kaj donacis poste 110 markojn por la infanoj en Nikaragua. Ankaŭ salutkartojn pro la naskiĝtago de Nelson Mandela estis senditaj al Suda Afriko.

Demandite pri lia motivo por la lernado de Esperanto la 11-jaraĝa Torsten Knapp skribis: „Mi trovas bele, konservi amikecon kun aliaj infanoj." Dum tiu renkontiĝo ĉiuj trovis novajn amikojn enlande kaj eksterlande. Per Esperanto ili konservu tiun amikecon. La 4-a LER okazos de 6. — 11. 8. 1984 denove ĉe Straussberg. Interesuloj skribu al Fritz Wollenberg, 1035 Berlin, Finowstraße 23.

Fritz Wollenberg

KORESPONDDEZIROJ

(Ni nur publikigos tajpitajn koresponddezirojn)

Bulgario

Hristo Tonev, str. „P. Volov" 12, **Šumen,** dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.
Junulinoj, 16j., dez. kor. k. samaĝuloj: Sonja Liubenova Sergeeva, **1373 Sofio,** str. Šuhodelska-12, dombloko 5 THSP, Radostina Dimitrova Ivanova (sama adreso).

ĈSSR

Edukisto, 31j., dez. kor. tutmonde, kol. bk, E-insignojn, librojn: František Horáček, Kachlkova 6, **635 00 Brno.**

GDR

Inĝenierino, 43j., dez. kor. k. virinoj pri modo, pinglolaboro, kuirreceptoj, vivkutimoj: Gisela Kratz, Buschstr. 11, **2750 Schwerin.**
Birgit Welz, **1807 Ziesar,** Str. d. Jungen Pioniere 12a, dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, literaturo, E-movado.
Sylvia Lassika, **1406 Hohen-Neuendorf,** Annemariestr. 3, dez. kor. tutmonde kun gejunuloj.
Margit Müller, **1701 Treuenbrietzen A,** Birkenweg 10, PSF 33, dez. kor. tutmonde pri fremdaj lingvoj, E-movado, literaturo, antikvajoj.
12j. lernanto dez. kor. tutmonde: Stefan Kluge, **6120 Eisfeld,** Karl-Marx-Str. 6.

Hungario

Junulo, 19j., dez. kor. k. gejunuloj p. ĉ. t.: Csaba Németh, **8840 Csurgó,** Noszlopy u. 20.
Junulo, 16j., dez. kor. k. samaĝaj junulinoj el GDR, kol. diskojn: Ákos Magyari, **3200 Gyöngyös,** Rákóczi u. 2.
35j. elektromuntisto, dez. kor. k. germanaj geesperantistoj pri literaturo, turismo, poemoj, kol. bk, E-insignojn: Györö Dévényi, **1105 Budapešto,** Körösi Csoma Sàndor u. 43/51, A/1. III. em. 4.
Junulino, 18j., dez. kor. kun gejunuloj el GDR: Anna Varro, **6635 Szegvár,** Lenin u. 43a.
Komencantoj dez. kor.:
— Tibor Dávid, **3304 Eger,** Berva szálló, 26j. bindisto
— Pál Tóth,**3304 Eger,** Berva szállo, 19j. tornisto
— László Kovács, **3304 Eger,** Berva szálló, 21j. tornisto
— József Veréb, **3304 Eger,** Berva szálló, 19j. tornisto z
— Erzsébet Kovacs, **3258 Tarnalelesz,** Kossuth u. 195, 19j. kemia faklaboristino
— Margit Kovács, **3258 Tarnalelesz,** Kossuth u. 195, kemia faklaboristino.
Junulo, 16j., dez. kor. k. germanaj gejunuloj: Zsolt Zerényi, **7815 Harkány,** Beresényi u. 16.
Lernantino, 18j., dez. kor. k. gejunuloj tutmonde: Eva Benei, **4130 Derecske,** Viola u. 8.
20j. teknika bibliotekistino, komencantino, dez. kor. tutmonde, kol. bk: Gabriella Tekulics: **1117 Budapest XI,** Orlay u. 8.
Junulino, 17j., dez. kor. k. 17 — 25j. geesp. pri historio, lingvoj, muziko, sporto: Enikö Lörincz, **5700 Gyula,** Budrió 1. III./11.
Junulino, 16j., dez. kor. k. gejunuloj: Gabriela Šoš, **4151 Püspökladany,** Hösök tere 2. sz.
Lernantino dez. kor. k. germanaj geesp.: Tünde Meŝter, **4405 Nyiregyháza,** Sipacs u. 107.
20j. komencanto dez. kor. k. junaj geesp.: Csaba Bokkon, **8400 Ajka,** Verseny u. 2.
Teknikisto, 50j., dez. kor. k. esp. el GDR p. ĉ. t.: András Borka, **6772 Deszk,** Alkotmány u. 14.
Komencanto, 16j., dez. kor. k. samaĝulino: Csaba Nagy, **8800 Nagykanizsa,** Ifjúság u. 42.
István Galazek, **1376 Budapest 62,** Postán maradó, dez. kor. kun germanaj junulinoj pri vojaĝoj, teatro, edukado, ĝardenkulturo, muziko.

Mongolio

Fraŭlo, 36j., dez. kor. tutmonde pri medicino, sporto, kol. pm, bk: D. Ĉulnunbaatar, M.P.R. **Ulan-Bator-30,** pk. 13.

Pakistano

Studento, 20j., dez. kor.: Nayyar-Hussain, W-NO-8-Houseno 364 Grain Market, **Sahiwal.**

Pollando

Tomasz Kubiszewski, **Wroclaw,** str. Zautek Rogozinski 4, m6, 15j., dez. kor. tutmondo pri literaturo, moderna muziko, sporto, kino, teatro.
Gekomencantoj dez. kor.:
— Bogumila Jarosz, **26-630 Jedlnia Letnisko,** Aleksandrów 48, 28j., pri turismo, geografio, junulara muziko
— Pawel Barlog, **26-600 Radom,** ul. Swietokrzyska 25 m 30, 32j., pri vivo de gejunuloj, turismo
— Maria Mosionek, **26-600 Radom,** ul. Sowinskiego 5 m 56, 23j., pri junulara muziko, turismo, sporto, filmarto, filatelo.

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16